


EL POPOLA ĈINIO

3
1976

中國報道



**VIVU ETERNE EN NIA
MEMORO KAMARADO
ĜOŬ ENLAJ, GRANDA
PROLETA REVOLUCI-
ISTO DE LA ĈINA PO-
POLO KAJ ELSTARA
KOMUNISMA BATAL-
ANTO!**




Kamarado Ĝoŭ Enlaj



De la 12-a ĝis la 14-a januaro, pli ol 40,000 laboristkamparanoj, soldatoj de ĈPL, oficistoj kaj lernantoj de ĉefurbo kun profunda proleto amo okazigis solenan funebra ceremonion en la Kultura Palaco de Laboruloj por malĝojnebri pri K-do Ĝoŭ En, granda proleta revoluciisto de ĉina popolo kaj elstara komunisma batalanto.

De la 10-a ĝis 11-a de januaro,
kun estimo, amo kaj ekstrema
malĝojo la reprezentantoj de la
ĉefurbaj amasoj adiaŭis la kor-
pon de la forpasinta Kamarado
Ĝoŭ Enlaj, granda proleta re-
voluciisto de la ĉina popolo kaj
elstara komunisma batalanto.





Gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato kaj diversrondaj amasoj de la ĉefurbo solene okazigas funebran kunvenon pri la forpaso de K-do Ĝou Enlaj, en kiu K-do Deng Hiaŭping, vicprezidanto de CK de KPĈ kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, faras funebran paroladon. De maldekstre en la unua vico: Nie Ĵongĝen, Gu






Ho Ĵuo, Su Ĝenhua, Ĉen Jongguj, Vang Donghing, Ĝi Dengkuj, Li Hiannian, Ĝiang King, Ĝang Ĉunkiaŭ, Ĝianĵing, Vang Hongven, Song Kingling, Ĵaŭ Venĵuan, Ĉen Hilian, Hua Guofeng, Vu De, Vu Guĵhian, Ĝifu, Hĵu Hiangkian kaj Ĉen Ĵun.



En la funebra kunveno ĉiuj ĉeestantoj solene staras en la funebra muziko.



Gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato K-doĵ Vang Hongven, Je Gianĵing kaj Deng Hiaŭping kore kondolencas K-dinon Deng Jingĉaŭ, malnovan kunbatalantinon kaj edzinon de K-do Ĝoŭ Enlaj.

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

BILDPAĜOJ:

- (1) Solena funebrado pri Kamarado Ĝoŭ Enlaj
- (2) La brila kaj batala vivo de Kamarado Ĝoŭ Enlaj por la komunisma afero
- (3) Viglecplena juna generacio
- (4) Novan veston portas la regiono plagita de sismo

KOVRILO:

Paĝo 1: La Monumento de Popolaj Herooj sur Tian-anmen-placo

Paĝo 4: Pinoj



Enhavo

Funebra sciigo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj la Ŝtata Konsilantaro pri la forpaso de Kamarado Ĝoŭ Enlaj	2
Nomlisto de la Funebra kaj Sepulta Komitato por la Forpasinta Kamarado Ĝoŭ Enlaj	4
Funebra parolado de Vicprezidanto Deng Hiaŭping	5
Solena funebrado pri Kamarado Ĝoŭ Enlaj	9
Sagaca transpaso de Ĝinŝa-rivero	23
Miliono da ĉinaj kadroj iris al la agrikultura fronto	31
Por konstrui socialismon rapide	35
ĈINAJ NACIECOJ: La buji-oj	38
AMIKECO: Amikeco ĉe Niloj	40
Elfoso de fosilio de antikva elefanto de la Flava Rivero	42
KURANTAJ AFEROJ	44

Funebra sciigo de la Komunista Partio de Ĉinio la Tutlanda Popola Konsilantaro pri la forpa

Kun ekstreme profunda malĝojo la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Ŝtata Konsilantaro proklamas, ke Kamarado Ĝoŭ Enlaj, membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato, vicprezidanto de la Centra Komitato, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj prezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, forpasis pro kancero je 57 minutoj post la 9-a horo de la 8-a de januaro, 1976, en la aĝo de 78 jaroj.

Kamarado Ĝoŭ Enlaj estas eminenta membro de la Komunista Partio de Ĉinio, granda proleta revoluciisto de la ĉina popolo, fidela revolucia batalanto de la ĉina popolo kaj longe elprovita elstara gvidanto de la Partio kaj la ŝtato.

Post la malsaniĝo de Kamarado Ĝoŭ Enlaj en 1972, li estis ĉiam sub la kon-

stanta kora zorgo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, kaj medicinaj laborantoj faris al li multflankan zorgeman kuracadon. Kamarado Ĝoŭ Enlaj ĉiam persistis en laborado kaj malcedeme luktis kontraŭ la malsano. Sed la malsano graviĝis, kaj la kuracado montriĝis senefika, la granda batalanto de la ĉina popolo Kamarado Ĝoŭ Enlaj finfine adiaŭis nin por eterne. Lia forpaso estas grandega perdo por nia Partio, nia armeo kaj nia popolo, por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando, por la internacia afero de oponado kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj hegemoniismo kaj por la internacia komunisma movado.

Kamarado Ĝoŭ Enlaj estis fidela al la Partio kaj la popolo, brave bataladis, senrezerve kaj senegoisme dediĉis sian tutan energion por plenumi la proletan revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj por gajni la venkon de la liberiga afero de la ĉina popolo kaj la komunisma afero. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, Kamarado Ĝoŭ Enlaj faris neforgeseblajn kontri-

Centra Komitato de la la Konstanta Komitato de Kongreso kaj la Ŝtata de Kamarado Ĝoŭ Enlaj

de buojn kaj senmortajn meritojn en konstruado kaj disvolvado de la marksisma Komunista Partio de Ĉinio, en konstruado kaj disvolvado de la ĉiamvenka popola armeo, en gajno de la venko de la Novdemokratia Revolucio, en fondado de la socialisma nova Ĉinio, en firmigo de la granda unuiĝo de ĉiuj naciecoj sur la bazo de la laborista-kamparana alianco gvidata de la laboristaro, en disvolvado de la revolucia unueca fronto, en gajno de la venko de la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado, en gajno de la venko de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, en firmigo de la diktaturo de la proletaro en nia lando, en plifortigo de la unuiĝo de la internaciaj revoluciaj fortoj kaj en la batalo kontraŭ imperiismo, social-imperiismo kaj moderna reviziismo, kaj li estas kore amata kaj estimata de la tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo.

La vivo de Kamarado Ĝoŭ Enlaj estas la vivo de brila batalado por la komu-

nisma afero kaj persistado en daŭrigo de la revolucio.

La forpaso de Kamarado Ĝoŭ Enlaj kaŭzos profundan malĝojon en la koro de la popolo de nia lando. Ni devas turni nian malĝojegon en fortojn. La tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo devas lerni de Kamarado Ĝoŭ Enlaj liajn proletan revolucion spiriton kaj noblajn revolucionajn kvalitojn kaj, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ, unuiĝi, teni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron, persisti pri la fundamenta linio de la Partio, persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, persisti pri proleta internaciismo, firmigi kaj disvolvi la venkojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj batali por firmigi la diktaturon de la proletaro, por oponi kaj preventi reviziismon, por konstrui nian landon en socialisman modernan potencan landon kaj por la venko de la komunisma afero.

Eterne vivu en nia memoro Kamarado Ĝoŭ Enlaj, la granda proleta revoluciisto de la ĉina popolo kaj la eminenta komunisma batalanto!

Nomlisto de la Funebra kaj Sepulta Komitato por la Forpasinta Kamarado Ĝoŭ Enlaj

Maŭ Zedong, Vang Hongven, Je Gian-
jing, Deng Hiaŭping, Ĝu De, Ĝang
Ĉunkiaŭ, Vej Guoking, Liu Boĉeng,
Giang King (virino), Hju Ŝijoŭ, Hua
Guofeng, Gi Dengkuj, Vu De, Vang
Donghing, Ĉen Jongguj, Ĉen Hilian, Li
Hiannian, Li Deŝeng, Jaŭ Venjuan, Vu
Gujhian (virino), Su Ĝenhua, Ni Ĝifu,
Sajfudin, Song Kingling (virino), Guo
Moĵuo, Hju Hiangkian, Nie Ĵongĝen, Ĉen
Jun, Tan Ĝenlin, Li Gingkjuan, Ĝang
Dingĉeng, Caj Ĉang (virino), Ulanfu,
Ngapo Ngavang-ĝigme, Ĝoŭ Gianĵen,
Hju Deheng, Hu Gjueven, Li Suven
(virino), Jaŭ Lianvej, Deng Jingĉaŭ
(virino), Caŭ Ji-oŭ (virino), Su Ju,
Vang Ĝen, Ju Kiuli, Gu Mu, Sun Gian,
Ŝen Janbing, Pebala Gelieh-namĝe, Giang
Hua, Ĝang Jaŭci, Guo Jufeng, Geng

Biaŭ, Luo Kingĉang, Li Daĝang, Lu
Jing, Hju Gianŝeng, Mo Aj, Ĝu Muĝi,
Deng Gang, Vu Baŭhua, Gin Zumin, Hie
Gingji (virino), Jang Polan (virino),
Kiaŭ Guanhua, Ŝi Jiĝi, Li Kiang, Fang
Ji, Ŝa Feng, Ĉen Ŝaŭkun, Ĝoŭ Zigian,
Liu Hijaŭ, Li Gitaj, Vang Ĝeng, Li
Ĉengfang, Bian Giang, Vang Jang, Hju
Ginkiang, Kang Ŝi-en, Kian Ĝengjing
(virino), Kian Ĝiguang, Van Li, Je Fej,
Ĝong Fuhiang, Ĝang Ginfu, Fan Ziju,
Ju Hujjong, Ĝoŭ Ĵonghin, Liu Hiang-
ping (virino), Ĝuang Zedong, Vu King-
tong, Su Ging, Fang Kiang, Ĉen Guo-
dong, Jang Ĉengvu, Liang Bijē, Ĝang
Zonghjun, Lin Lijun (virino), Caj Hiaŭ,
Ĝu Junŝan, Liu Venhuj, Ŝi Liang
(virino), Hu Juĝi, Ŝa Kianli, Gi Fang,
Huang Dingĉen, Ĝoŭ Pejjuan, Tian Fuda

Funebra parolado de Vicprezidanto Deng Hiaŭping

Hodiaŭ en plej profunda malĝojo ni funebras pri la eminenta membro de la Komunista Partio de Ĉinio, granda proleta revoluciisto, elstara komunisma batalanto kaj longe elprovita eminenta partia kaj ŝtata gvidanto de la ĉina popolo Kamarado Ĝoŭ Enlaj.

Depost kiam Kamarado Ĝoŭ Enlaj malsaniĝis je kancero en 1972, li estis ĉiam sub la konstanta kora zorgo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, kaj medicinaj laborantoj faris al li multflankan zorgeman kuracadon. Li ĉiam persistis en laborado kaj malcedeme luktis kontraŭ la malsano. Sed la malsano graviĝis, kaj la kuracado montriĝis senefika, kaj la koro de Kamarado Ĝoŭ Enlaj ĉesis bati je 57 minutoj post la 9-a horo de la 8-a de januaro, 1976. La tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo de nia lando sentas profundan malĝojon pro la perdo de nia ĉefministro.

La forpaso de Kamarado Ĝoŭ Enlaj estas grandega perdo por nia Partio, nia armeo kaj nia popolo, por la socialisma revolucio kaj konstruado de nia lando, por la internacia afero de oponado kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj hegemoniismo kaj por la internacia komunisma movado.

De sia juneco Kamarado Ĝoŭ Enlaj sin dediĉis al la liberiga afero de la ĉina po-

polo. En 1919, li aktive partoprenis en la Movado de la Kvara de Majo kaj faris revoluciajn aktivadojn kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. De 1920 ĝis 1924, li estis unue en Francio kaj poste en Germanio por tie labori kaj samtempe studi, kaj tie li propagandis marksismon al ĉinaj studentoj kaj laboristoj loĝantaj en Eŭropo. En 1922, li aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio, laboris kiel sekretario de la Eŭropa Ĝenerala Filio de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo kaj samtempe laboris en la Eŭropa Ĝenerala Filio de la Komunista Partio de Ĉinio. En la periodo de la Unua Enlanda Revolucia Milito, li partoprenis en la Norda Ekspedicio kaj faris gravan kontribuon al la renverso de la reakcia regado de la nordaj militaristoj. De 1924 ĝis 1926, li laboris sinsekve kiel prezidanto de la Guangdong-Guanghi-regiona Komitato de KPĈ, estro de la Politika Departemento de la Huangpu-a Milita Lernejo, estro de la Politika Departemento de la Unua Korpuso de la Nacia Revolucia Armeo, membro de la Konstanta Komitato de la Guangdong-Guanghi-regiona Komitato de KPĈ kaj kumulis estron de ĝia Departemento pri Militaj Aferoj. En vintro de 1926, li iris labori en la Centra Komitato de la Partio en Ŝanhajo, kaj poste li laboris kiel sekretario de la Giangsu-Ĝegiang-regiona Mi-

lita Komisiono de KPC kaj sekretario de la Milita Komisiono de CK de KPC. Li estis la ĉefa gvidanto de armita insurekcio de ŝanhajaj laboristoj en 1927. Post kiam Ĉiang Kajŝek kaj Vang Gingvej perfidis la revolucion, Kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj kamaradoj kune gvidis la Insurekcion en Nanĉang je la Unua de Aŭgusto por savi la revolucion kaj en la insurekcio li laboris kiel sekretario de la Fronta Komitato de KPC. En la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito, li persistis en subtera revolucia laboro de la Partio en Ŝanhajo kaj laboris kiel estro de la Organiza Departemento de CK de KPC, sekretario de la Milita Komisiono de CK k.a. Post kiam li iris en la Centran Revolucian Bazon en Gianghi en decembro de 1931, li laboris kiel sekretario de la Centra Buroo de la Centra Soveta Regiono de KPC, politika komisararo en la Unua-fronta Armeo de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo kaj vicprezidanto de la Revolucia Milita Komisiono de CK. Post la Konferenco de Zunji, sub la gvido de Prezidanto Maŭ li plue laboris kiel vicprezidanto de la Revolucia Milita Komisiono de CK kaj partoprenis en la organiza kaj gvida laboro de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo en ĝia venka plenumo de la Longa Marŝo de 25,000 lioj. Kiam okazis la Hi-an-a Evento en decembro de 1936, Kamarado Ĝoŭ Enlaj, kiel plenrajta reprezentanto de nia Partio, faris traktadon kun la arestita Ĉiang Kajŝek. En tio li rezolute praktikis la principon de Prezidanto Maŭ, devigis Ĉiang Kajŝek ĉesigi la enlandan militon, efektivigis pacan solvon de la Hi-an-a Evento kaj akcelis la formiĝon kaj disvolviĝon de la

Kontraŭjapana Nacia Unueca Fronto. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, li laboris kiel reprezentanto de la Centra Komitato de la Partio kaj sekretario de la Sudĉinia Buroo de CK, faris laboron por la Unueca Fronto en la regiono regata de Kuomintango kaj gvidis la laboron de nia partia organizo en tiu regiono. Longe restadante en Ĉongking, kie sidis la kuomintanga registaro, li ne timis danĝeron kaj senŝanceliĝe praktikis la principon de Prezidanto Maŭ kaj faris bravan batalon kontraŭ la kontraŭrevolucia politiko de Kuomintango pri pasiva rezistado kontraŭ la japanaj agresantoj kaj aktiva oponado kontraŭ la komunistoj. En la komenca periodo de la Tria Enlanda Revolucia Milito, en aŭgusto de 1945, li akompanis Prezidanton Maŭ al Ĉongking por fari traktadon kun Kuomintango. Post la subskribo de la "Interkonsento de la 10-a de Oktobro", li daŭre faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la usonaj kaj Ĉiangkajŝek-aj reakciuloj en Ĉongking kaj Nankino, direktante la Delegacion de la Komunista Partio de Ĉinio. En novembro de 1946 Kamarado Ĝoŭ Enlaj revenis de Nankino al Jan-an. Kiam Ĉiangkajŝek-aj trupoj faris grandskalan atakon kontraŭ la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono en marto de 1947, Kamarado Ĝoŭ Enlaj restis en norda Ŝenhi kune kun Prezidanto Maŭ kaj partoprenis en gvidado de la Popola Liberiga Milito. En la nova historia stadio de socialisma revolucio kaj la diktaturo de la proletaro de nia lando, Kamarado Ĝoŭ Enlaj ĉiam laboris kiel ĉefministro de la registaro de la Ĉina Popola Respubliko de post ĝia fondiĝo kaj kumulis siatempe ministron de eksteraj

aferoj, kaj laboris kiel vicprezidanto de la Milita Komisiono de CK de KPĈ, vicprezidanto de la Unua Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj prezidanto de la Dua kaj Tria Tutlandaj Komitatoj de ĈPPIK. Krome li estis elektita kiel reprezentanto de ĉiuj kvar tutlandaj popoloj kongresoj.

Ekde la Kvina Tutlanda Kongreso de la Partio, Kamarado Ĝoŭ Enlaj estis elektita kiel membro de la Centra Komitato en la kvina kaj ĉiuj postaj kongresoj de KPĈ. En la Kunveno de CK en la Sepa de Aŭgusto, 1927, li estis elektita kiel alterna membro de la Politika Buroo. Ekde la Sesa Tutlanda Kongreso de la Partio, li estis elektita kiel membro de la Politika Buroo de ĉiuj sekvantaj Centraj Komitatoj. En la Kvina Plena Sesio de la Sesa CK kaj la Unua Plena Sesio de la Sepa CK, li estis elektita kiel sekretario de la Sekretariejo de CK. En la Unuaj Plenaj Sesioj de la Oka, Naŭa kaj Dekaj CK, li estis elektita kiel membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK. En la Unuaj Plenaj Sesioj de la Oka kaj Dekaj CK li estis elektita kiel vicprezidanto de la Centra Komitato.

Kamarado Ĝoŭ Enlaj estis fidela al la Partio kaj la popolo, brave bataladis, senrezerve kaj senegoisme dediĉis sian tutan energion por plenumi la proletan revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj por gajni la venkon de la liberiga afero de la ĉina popolo kaj la komunisma afero. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, Kamarado Ĝoŭ Enlaj faris neforgeseblajn kontribuojn kaj senmortajn meritojn en konstruado kaj disvolvado de la marksisma Komunista Partio de Ĉinio, en

konstruado kaj disvolvado de la ĉiamvenka popola armeo, en gajno de la venko de la Novdemokratia Revolucio, en fondo de la socialisma nova Ĉinio, en firmigo de la granda unuiĝo de ĉiuj naciecoj sur la bazo de la laborista-kamparana alianco gvidata de la laboristaro, en disvolvado de la revolucia unueca fronto, en gajno de la venko de la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado, en gajno de la venko de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj en firmigo de la diktaturo de la proletaro en nia lando. La tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo kore amas kaj estimas lin.

En internaciaj aferoj, Kamarado Ĝoŭ Enlaj decideme plenumis la revolucion diplomatan linion de Prezidanto Maŭ kaj persistis en internaciismo de la proletaro. Ankaŭ en plifirmigo de la unuiĝo de nia Partio kun la marksismaj partioj kaj organizoj de aliaj landoj, en la batalo kontraŭ la moderna reviziismo, en akcelo de la disvolviĝo de la internacia komunisma movado, en plifirmigo de la unuiĝo de nia popolo kun la popoloj de ĉiuj aliaj landoj, precipe tiuj de la landoj de la tria mondo, en klopodado por starigi kaj disvolvi rilatojn kun ĉiuj landoj sur la bazo de la kvin principoj de paca kunekzistado kaj en unuiĝo kun ĉiuj unuigeblaj fortoj en la mondo por batali kontraŭ imperiismo kaj socialimperiismo, li faris neforgeseblajn kaj eminentajn kontribuojn kaj ĝuis estimon de la tutmonda popolo.

La vivo de Kamarado Ĝoŭ Enlaj estas la vivo de brila batalado por la komunisma afero kaj vivo de persistado en

daŭrigo de la revolucio. Li estas lernenda ekzemplo por niaj tuta Partio, tuta armeo kaj tuta popolo.

Funebrante pri Kamarado Ĝoŭ Enlaj, ni devas lerni lian senliman fidelecon al Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso. Li kore amis kaj respektis nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ, rezolute defendis la proletan revolucion linion de Prezidanto Maŭ, persistis en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro kaj en oponado kaj preventado de reviziismo, kaj bataladis dum la tuta vivo por efektivi la grandan idealon de komunismo.

Ni devas lerni lian noblan kvaliton de tutkora servado al la popolo. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, Kamarado Ĝoŭ Enlaj plenumadis la pezan taskon de aranĝado de ĉiutagaj aferoj de la Partio kaj la ŝtato. Li estis ĉiam diligenta kaj konscienca, pena kaj senplenda, nelaciĝbla kaj sinforgesa en laborado por la interesoj de la ĉina popolo kaj la tutmonda popolo.

Ni devas lerni lian senŝanceliĝecon en batalado kontraŭ la malamikoj. Kiel ajn kruela estis la blanka teroro, kiel ajn intensa estis la armita batalo, kaj kiel ajn akra estis la vid-al-vida traktado kun la malamikoj, li ĉiam sin montris sentima al vivdanĝero, sagaca kaj kuraĝa, senŝanceliĝa kaj aplomba, kaj fidoplena je la venko.

Ni devas lerni lian fortan proletan partiecon. Li estis malkaŝema, ĉiam zorgis pri la interesoj de la tuto, observis la disciplinon de la Partio, rigore sin analizis, lertis en unuiĝo kun la vasta amaso de kadroj kaj defendis la solidarecon kaj unuecon de la Partio. Li tenis intimajn rilatojn kun la vastaj amasoj kaj estis ekstreme varmkora al la popolo. Li firme praktikis la principon de kombiniĝo de maljunaj, mezaĝaj kaj junaj kadroj en

gvidado kaj entuziasmoplene subtenis la novajn fortojn kaj novajn aferojn aperintajn en la Granda Proleta Kultura Revolucio.

Ni devas lerni lian bonan stilon de modesteco kaj singardemo, afableco kaj facila alirebleco, dono de bonaj ekzemploj per propraj agoj kaj malluksemo. Ni devas lerni de li pri persistado en proleta vivstilo kaj oponado kontraŭ burĝa vivstilo.

Ni devas lerni lian revolucionan sistemon en batalado kontraŭ malsano. Dum sia malsano, li senĉese studis kaj plenumis politikojn de Prezidanto Maŭ kaj daŭre persistis en studo de verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkoj de Prezidanto Maŭ. Eĉ kiam tre graviĝis lia malsano, li ankoraŭ foje kaj refoje aŭskultis la du brilajn poemojn de Prezidanto Maŭ publikigitajn je la novjara tago. Tio plene montris lian neflekseblan revolucionan spiriton.

La granda revolucia batalanto de la ĉina popolo Kamarado Ĝoŭ Enlaj adiaŭis nin por eterne. Ni devas turni nian malĝojegon en fortojn kaj, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ, unuiĝi, teni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron, serioze studi la teorion pri la diktaturo de la proletaro, persisti pri la fundamenta linio de la Partio, persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, persisti pri la revoluciaj diplomatiaj linio kaj politikoj de Prezidanto Maŭ, firmigi kaj disvolvi la venkojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj batali por firmigi la diktaturon de la proletaro, por oponi kaj preventi reviziismon, por konstrui nian landon en socialisman modernan potencon landon kaj por la venko de la komunisma afero.

Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn!

Solena Funebrado pri Kamarado

Ĝoŭ Enlaj

Post la forpaso de la granda proleta revoluciisto de la ĉina popolo kaj la elstara komunisma batalanto Kamarado Ĝoŭ Enlaj, kun ekstreme profunda malĝojo la miriada diversnacieca popolo de nia tuta lando funebris pri la forpasinta ame estimata Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj.

En la 10-a kaj la 11-a de januaro la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj de nia lando, respondeculoj de ĉiuj departementoj de la Partio, la registaro kaj la armeo, reprezentantoj de la patriotaj demokratoj kaj pli ol 10,000 reprezentantoj de la ĉefurbaj popolamasoj iris al la Pekina Hospitalo malĝoje adiaŭi la korpon de la forpasinta K-do Ĝoŭ Enlaj.

De la 12-a ĝis la 14-a de januaro, pli ol 40,000 laboristoj, kamparanoj, soldatoj, ŝtataj oficistoj kaj lernantoj de la ĉefurbo Pekino kun profunda proleta sentimento okazigis en la Kultura Palaco de Laboruloj solenan funebran ceremonion.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj aliaj gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato ĉiu sendis funebran florkronon por la soleno.

En la halo de funebra ceremonio estis metitaj ankaŭ florkrono per speciala kuriero alsendita de Kim Il Sen, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Korea Partio de Laboro kaj prezidanto de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, kaj florkronoj senditaj de Enver Hoxha, la unua sekretario de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro, kaj Nicolae Ceausescu, ĝenerala sekretario de la Rumana Komunista Partio kaj prezidanto de la Socialisma Respubliko de Rumanio.

Florkronojn alsendis ankaŭ multaj marksismaj-leninismaj partioj kaj organizoj, gvidantoj kaj

registaroj de multaj landoj, diplomataro akreditita al Ĉinio, ambasadoroj kaj ambasadorejoj de diversaj landoj en Ĉinio, fremdlandaj gastoj, specialistoj, studentoj kaj lernantoj-praktikantoj en Pekino.

Pli ol 2,000 fremdlandaj amikoj vizite aŭ daŭre restantaj en Pekino iris al la Kultura Palaco de Laboruloj por funebri pri Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj.

Iris funebri pri Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj ankaŭ diplomataj senditoj de diversaj landoj al Ĉinio kaj reprezentantoj de la Administrejo de la Liberiga Organizo de Palestino en Pekino kaj tiuj de la Usona Interliga Sekcio en Ĉinio. Gvidantoj de niaj Partio kaj ŝtato respektive akceptis en la halo de la funebra ceremonio la fremdlandajn funebrantojn kaj esprimis al ili profundan dankon.

Post la forpaso de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, registaroj, marksismaj-leninismaj partioj kaj organizoj, organizoj de naciliberigaj movadoj kaj amikoj el multaj landoj alsendis kondolencajn telegramojn kaj leterojn aŭ publikigis deklarojn aŭ paroladojn por esprimi sian doloran funebron.

Posttagmeze de la 15-a de januaro niaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj kaj pli ol 5,000 reprezentantoj de amasoj el diversaj rondoj en la ĉefurbo solene okazigis kunvenon en la Popola Halo por dolore funebri pri Kamarado Ĝoŭ Enlaj, eminenta membro de la Komunista Partio de Ĉinio, granda proleta revoluciisto, elstara komunisma batalanto kaj longe elprovita eminenta partia kaj ŝtata gvidanto de la ĉina popolo.

Tiutage tra la tuta lando la nacia standardo estis duone hisita en signo de funebro kaj ĉiuj amuzaj aktivadoj estis ĉesigitaj.

En la halo de funebra kunveno regis silenta soleneco. Super la enirejo de la halo pendis horizontala rubandego kun la surskribo: "Eterne vivu en nia memoro Kamarado Ĝoŭ Enlaj, granda proleta revoluciisto de la ĉina popolo kaj elstara komunisma batalanto!" Meze sur la fundo de la halo pendis portreto de Kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj sube estis urno de lia cindro kovrita per la standardo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉirkaŭita de verdaj pinoj kaj freŝaj floroj. La muroj de la halo estis garnitaj per nigraj funebraj krepoj.

Ambaŭflanke de la portreto de Kamarado Ĝoŭ Enlaj staris florkronoj alsenditaj de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.

En la halo estis ankaŭ florkronoj alsenditaj de aliaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj.

La florkrono oferita de Kamaradino Deng Jingĉaŭ, membro de CK de KPC kaj malnova kunbatalantino kaj edzino de Kamarado Ĝoŭ Enlaj, estis metita antaŭ la cindra urno.

En la halo estis ankaŭ florkronoj alsenditaj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, la Ŝtata Konsilantaro, la Milita Komisiono de CK de KPC, la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, la departementoj de CK de KPC, la ŝtataj organoj, la amasaj organizoj, la ĝeneralaj departementoj de ĈPLA, la Scienca kaj Teknika Komisiono de Nacia Defendo, la ĉefkomandoj de diversaj armeoj kaj armilaroj, la militaj lernejoj, la grandaj militaj regionoj, la partiaj komitatoj kaj revoluciaj komitatoj de la 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, patriotaj samlandanoj el Tajvan-provinco, la Ŝanhaja Ĝenerala Sindikato kaj la partiaj komitatoj kaj revoluciaj komitatoj de la urboj Kantono,

Nanĉang, Vuhan, Nankino, Ĉongking, Hi-an kaj Jan-an.

Je la tria horo posttagmeze, Kamarado Vang Hongven, vicprezidanto de CK de KPC, malfermis la funebrian kunvenon. Ĉiuj ĉeestantoj funebriis per solena staro en funebra muziko.

Kamarado Deng Hiaŭping, vicprezidanto de CK de KPC kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, faris funebrian paroladon (vidu p. 5 en ĉi tiu numero).

Post funebra parolado de Kamarado Deng Hiaŭping, ĉiuj ĉeestantoj trifoje riverencis antaŭ la portreto de Kamarado Ĝoŭ Enlaj.

Kamaradino Deng Jingĉaŭ ĉeestis la funebrian kunvenon. La partiaj kaj ŝtataj gvidantoj esprimis al ŝi koran kondolencon.

Laŭ la testamento de Kamarado Ĝoŭ Enlaj, lia cindro estos disŝutita en riverojn kaj sur la teron de la patrolando.

Post la forpaso de Kamarado Ĝoŭ Enlaj diversnaciecaj popoloj de nia lando ĉu en la urboj aŭ en la vasta kamparo, ĉu en la malproksimaj landlimaj regionoj aŭ en la gardejoj kaj armeaj garnizonoj, ĉu en la galopantaj trajnoj, sur la oceanaj varŝipoj veturantaj sur Pacifiko, Atlantiko, Hinda Oceano aŭ sur la diversaj laborpostenoj, ĉiuj montris sian profundan funebbron pri Kamarado Ĝoŭ Enlaj per diversaj formoj. Ili diris, ke por la tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj estas modelo por imitado, kaj ke li por ĉiam vivos en ilia memoro kaj ili certe turnos malĝojon en fortojn, lernos liajn proletan revolucion spiriton kaj noblajn revolucionajn kvalitojn por unuiĝi sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel ĉefo, teni la klasbatalon kiel ĉefĉeneron, pli bone plenumi la diversajn taskojn asignitajn de la Partio kaj brave antaŭenmarŝi laŭ la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

LA BRILA KAJ BATALA VIVO DE KAMARADO ĜOŬ ENLAJ POR LA KOMUNISMA AFERO


Kamarado Ĝoŭ Enlaj estis eminenta membro de la Komunista Partio de Ĉinio, granda proleta revoluciisto de la ĉina popolo, fidela revolucia batalanto de la ĉina popolo kaj longe elpro-vita elstara gvidanto de la Partio kaj la ŝtato.

Kamarado Ĝoŭ Enlaj estis fidela al la Partio kaj al la popolo, brave batalis, senrezerve kaj senegoisme dediĉis sian tutan energion por plenumi la proletan revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj por gajni la venkon de la liberiga afero de la ĉina popolo kaj la komunisma afero. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, Kamarado Ĝoŭ Enlaj faris neforgeseblajn kontribuojn kaj senmortajn meritojn en konstruado kaj disvolvado de la marksisma Komunista Partio de Ĉinio, en konstruado kaj disvolvado de la ĉiamvenka popola armeo, en gajno de la venko de la Novdemokratia Revolucio, en fondado de la socialisma nova Ĉinio, en firmigo de la granda unuiĝo de ĉiuj naciecoj sur la bazo de la laborista-kampana alianco gvidata de la laboristaro, en disvolvado de la revolucia unueca fronto, en gajno de la venko de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj en firmigo de la diktaturo de la proletaro en nia lando, en plifortigo de la unuiĝo de la internaciaj revoluciaj fortoj kaj en la batalo kontraŭ imperiismo, social-imperiismo kaj moderna reviziismo, kaj pro tio li estas kore amata kaj estimata de la tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo.

La vivo de Kamarado Ĝoŭ Enlaj estas la vivo de brila batalado por la komunisma afero kaj persistado en daŭrigo de la revolucio. Li estas lernenda ekzemplo por niaj tuta Partio, tuta armeo kaj tuta popolo.

La granda revolucia batalanto de la ĉina popolo Kamarado Ĝoŭ Enlaj adiaŭis nin por eterne. Ni devas turni nian malĝojegon en fortojn, kaj, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ, unuiĝi, teni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron, serioze studi la teorion pri la diktaturo de la proletaro, persisti pri la fundamenta linio de la Partio, persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, persisti pri la revoluciaj diplomaciaj linio kaj politiko de Prezidanto Maŭ, firmigi kaj disvolvi la venkojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj batali por firmigi la diktaturon de la proletaro, por oponi kaj preventi reviziismon, por konstrui nian landon en socialisman modernan potencan landon, kaj por la venko de la komunisma afero.

Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn!



Kiam okazis la Movado de la Kvara de Majo, 1919, Kamarado Ĝou Enlaj estis en Tiangin.



Supre dekstre: De 1920 ĝis 1924, Kamarado Ĝou Enlaj estis unue en Francio kaj poste en Germanio por tie labori kaj samtempe studi, kaj tie li propagandis marksismon al inaj studentoj kaj laboristoj loĝantaj en Eŭropo. En 1922, K-do Ĝou Enlaj aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj laboris kiel sekretario de la Eŭropa Ĝenerala Filio de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo, kaj samtempe laboris en la Eŭropa Ĝenerala Filio de la Komunista Partio de Ĉinio.

Dekstre: De 1924 ĝis 1926, K-do Ĝou Enlaj laboris sinsekve kiel prezidanto de la Guangdong-Guanghi-regiona Komitato de KPC, estro de la Politika Departemento de la Huangpu-a Milita Lernejo, estro de la Politika Departemento de la Jnua Korpuso de la Nacia Revolucia Armeo, membro de la Konstanta Komitato de la Guangdong-Guanghi-regiona Komitato de KPC kaj kumulis estron de ĝia Departemento pri Militaj Aferoj.






Prezidanto Maŭ Zedong kaj Kamarado Ĝoŭ Enlaj en Jan-an, 1945



De oktobro de 1934 ĝis oktobro de 1935, K-do Ĝoŭ Enlaj partoprenis en la organiza kaj gvida laboro de la Ĉina Laborista-Kampana Ruĝa Armeo en ĝia venka plenumo de la Longa Marŝo de 25,000 lioj. Jen la foto de K-do Ĝoŭ Enlaj en la norda Ŝenhi.



Supre dekstre: Kiam okazis la Hi-an-a Evento en decembro de 1936, K-do Ĝoŭ Enlaj, kiel plenrajta reprezentanto de nia Partio, faris traktadon kun la arestita Ĉiang Kajŝek. En tio li rezolute praktikis la principon de Prezidanto Maŭ, devigis Ĉiang Kajŝek ĉesigi la enlandan militon, efektivigis pacan solvon de la Hi-an-a Evento kaj akcelis la formiĝon kaj disvolviĝon de la Kontraŭjapana Nacia Unueca Fronto. Jen la foto de K-do Ĝoŭ Enlaj en Jan-an ĵus veninta de Hi-an.



Kiam Ĉiangkajŝek-aj trupoj faris grand-
kalan atakon kontraŭ la Ŝenhi-Gansu-
linghia-a Limregiono en marto de 1947,
K-do Ĝoŭ Enlaj restis en norda Ŝenhi
une kun Prezidanto Maŭ kaj partoprenis
la gvidado de la Popola Liberiga Milito.

Dekstre: En marto de 1949, K-do Ĝoŭ
Enlaj en la Dua Plena Sesio de la Sepa
Centra Komitato de la Komunista Partio
de Ĉinio

Maldekstre: Dum la Kontraŭjapana
Rezistmilito, kiel reprezentanto de la
Centra Komitato de la Partio, K-do
Ĝoŭ Enlaj longe restis en Ĉongking, kie
sidis la kuomintanga registaro. Tie li ne
timis danĝeron kaj senŝanceliĝe praktikis
la principon de Prezidanto Maŭ kaj faris
bravan batalon kontraŭ la kontraŭrevo-
lucia politiko de Kuomintango pri pasiva
rezistado kontraŭ la japanaj agresantoj
kaj aktiva oponado kontraŭ la komunis-
toj. Jen la foto de K-do Ĝoŭ Enlaj en
la sidloko de la Delegacio de KPC, 50,
Zenggiajan, Ĉongking.






En septembro de 1949, K-do Ĝoŭ Enlaj en la Unua Plena Sesio de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco



Supre dekstre: En la 1-a de oktobro, 1949, K-do Ĝoŭ Enlaj partoprenis en la soleno pri la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko sur la pordego Tian-anmen.

K-do Ĝoŭ Enlaj persistis en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro kaj faris senmortajn meritojn por gajni la venkon de la Granda Proleta Kultura Revolucio.



En aŭgusto de 1970, K-do Ĝou Enlaj en la Dua Plena Sesio de la Naŭa Centra Komitato de KPC




En la 24-a de aŭgusto, 1973, en la nomo de la Centra Komitato de KPC, K-do Ĝou Enlaj faris politikan raporton en la Deko Tutlanda Kongreso de KPC.






En la 30-a de septembro, 1974, K-do Ĝoŭ Enlaj faris gratulan paroladon en la grandioza bankedo por celebri la 25-jaran datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.



En januaro de 1975, K-do Ĝoŭ Enlaj en grupa kunsido la Unua Sesio de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso la Ĉina Popola Respubliko



En junio de 1958, K-do Ĝoŭ Enlaj laboris sur la konstruejo de Šisanling - akvokonservejo de Pekino.




En oktobro de 1966, K-do Gōu Enlaj akceptis en Pekino la reprezentantojn de la progresintaj unuoj sur la petrola fronto. Jen li kore manpremis kun Vang Ginhi. "ferulo" de Daking-petrolkampo.



En majo de 1965, K-do Gōu Enlaj vizitis Daĝaj-brigadon de Hijang-gubernio, Ŝanhi-provinco.




K-do Ĝoŭ Enlaj
inter soldatoj de
ĈPLA



En aprilo de 1955, en la
nomo de la Ĉina Popola
Respubliko, K-do Ĝoŭ
Enlaj ĉeestis la Unuan
Azian-Afrikan Konferen-
con en Bandungo de In-
donezio.



decembro, 1963 ĝis februaro, 1964, kmanate de K-do Ĉen Ji, K-do Ĝou En-laj vizitis Albanion kaj dek afrikajn tri aziajn landojn, per tio plifortigis amikecon kaj unuiĝon inter la ĉina popolo kaj la popoloj de la koncernaj landoj. Jen K-do Ĝou En-laj kaj Ĉen Ji estis varme bonvenigataj de la ĉefurbaj popoloj kiam ili revenis al Pekino post vizitado.



novembro de 1964, en la tempo kiam K-do Ĝou En-laj partoprenis, kun la Partia Registara Delegacio de Ĉinio sub sia gvidado, en la celebrado de la 47-jara datreveno de la Oktobra Socialisma Revolucio de Sovetunio, li rezolute rebatis la malican atakon fare de la renegataj fortoj de sovetunia reviziismo al nia lando, kaj defendis Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson. Kiam K-do Ĝou En-laj revenis de Moskvo al Pekino, li ricevis solenan kaj varman bonvenigon de la ĉefurbaj popolanoj.



K-dō Gō Enlaj laboris en sia kabineto.

Sagaca transpaso de Ginŝa-rivero

de HIAŬ JINGTANG

POST la Konferenco de Zunji¹, la Unua-fronta Armeo de la Ruĝa Armeo sub la gvido de Prezidanto Maŭ gajnis grandan venkon super la malamikoj en la ĉirkaŭaĵo de Zunji, transpasis poste la riverojn Vugiang kaj Bejpan kaj plue marŝis suden al Junnan. En la marŝado, nia Ruĝa Kadra Regimento ĉiam servis kiel garda trupo de la centraj institucioj kaj la gvidantoj.

La kadra regimento konsistis el du infanteriaj batalionoj, unu speciala bataliono kaj unu taĉmento de superaj kadroj. Escepte de la membroj de la taĉmento, ĉiuj aliaj estis vivplenaj kaj spertaj kadroj el niaj kompanioj kaj plotonoj.

La vetero de aprilo en Junnan estis tre varma kaj ni ofte ŝvitegis eĉ en maldika uniformo. En la brilaj akvokampoj, tufoj de rizplantidoj sin svingadis en vento, kvazaŭ por nin bonvenigi. Sur la montetoj en ambaŭ flankoj de la vojoj, zumante flugadis abeloj jen tien jen ĉi tien inter buntaj floroj kaj densaj arboj — vere ĉarma estis la printempo. Kvankam tiam cent kelkdek mil malamikoj nin postkuris, tamen ni ĉiuj kredis, ke Prezidanto Maŭ certe povos, per sia lerta komandado, nin liberigi de la persekutantoj kaj konduki nin al venko. Kun gaja humoro la trupo marŝadis ĝuante la belan pejzaĝon de printempo.

Vespere, la trupo haltis en vilaĝo por tranokti. En noktomezo, mi eliris por fari kontrolon al

la gardstarantoj. Kiam mi iris antaŭ la pordon de la korto kie loĝis la estroj de la Centra Komitato de la Partio, mi rimarkis ke ankoraŭ brilas lamplumo en iu ĉambro. Kiu estro ankoraŭ ne dormis en tiel malfrua horo? Kiam mi estis demandanta pri tio al la gardstaranto, subite iu eliris el la domo. Li pli kaj pli proksimiĝis kaj nur kiam li venis tuj antaŭ nin, mi povis vidi klare, ke li estas Kamarado Ĝoŭ Enlaj. Mi prenis la starpazon de atento kaj demandis: “Ĉu vi ankoraŭ ne enlitiĝis, Vicprezidanto?” “Jes,” li respondis. “Vi jam finis la kontroladon, ĉu? Nu, eniru kaj iom sidu.”

Tio estis loĝejo de bienulo kun relative bonaj domoj. En la ĉambro okupita de Vicprezidanto Ĝoŭ troviĝis kelkaj malnovtipaj seĝoj kaj unu kvadrata manĝotablo, sur kiu briletis olea lampo kaj kuŝis kelkaj simplaj skribiloj kaj krome ankaŭ malgranda papera pakaĵo. Surmure pendis granda mapo, laŭ kio mi konjektis ke la vicprezidanto estis pripensanta la militiran vojon. En la malforta lamplumo la vizaĝo de la vicprezidanto aspektis pala kaj malgrasa kaj liaj okuloj ne tiel brilis kiel antaŭe. Ho, tro multe sin lacigis niaj estroj!


Post kiam ni sidiĝis, la vicprezidanto demandis min: “Kiom da homoj ankoraŭ restas en via kvina kompanio?” Mi respondis: “En la bataloj ĉe Zunji kaj Tuĉeng kelkaj vundiĝis aŭ

mortis kaj nun ankoraŭ restas pli ol cent dudek.” Poste li demandis min pri la marŝado, animŝtato, armiloj kaj ekipaĵoj de nia kompanio. Mi respondis liajn demandojn unu post alia. La vicprezidanto iom meditis kaj poste diris kun rideto: “Brile batalis via kvina kompanio ĉe Zunji kaj Tuĉeng. Vi devas tenadi tiun honoron.” Tion dirinte li elpakis biskvitojn sur la tablo kaj diris ke mi manĝu. Mi sciis, ke la biskvitoj estis alportitaj de la gardisto al li kiel noktomanĝo. Tiutempe estis tre malfacile akiri kelkajn biskvitojn kaj mi tuj diris: “Mi tro multe vespermanĝis kaj nun ankoraŭ sentas troplenecon de la stomako.” La vicprezidanto puŝis la paperan pakadon antaŭ min kaj ripetfoje diris ke mi manĝu. Fine mi devis preni duonpecon kaj maĉante atendis demandojn de la vicprezidanto. Sed li kvazaŭ estis ion pripensanta kaj longe silentis kaj diris je la fino: “Nu! jam estas malfrue, do iru ripozi.”

Elirinte el la domo de la vicprezidanto, mi konjektadis: Ĉu la vicprezidanto faris tiel detalan demandadon pri la stato de nia kompanio senkonsidere aŭ estis elektanta plenumanton de iu grava tasko? Tiam mi bedaŭris, ke mi ne kuraĝis demandi pri tio por akiri klaran informon.

En la sekvanta tago, la kompanianoj ĉiuj streĉe okupiĝis pri sinpurigo kaj pliigo de sia kunportata greno. Iuj estis mortigantaj pedikojn starante ĉirkaŭ kaldronego kun bola akvo en la korto, duaj estis senŝeligantaj rizon, triaj flikis vestojn kaj kvaraj viŝis pafilojn aŭ akrigis bajone-tojn. Mi plektis herbajn sandalojn sidante sub tegmentrando kune kun kelkaj kompanianoj kaj laborante mi aŭskultis ilian mallaŭtan interbabiladon. Iu diris: “Ĉu ne estas strange, ke ni ĉesas marŝi dum la persekutantoj jam estas ĉe nia postaĵo!” “Tute ne strange,” alia tuj interrompis lin. “Tio certe montras, ke ni faros batalon kon-

La rivero Ginŝa



traŭ ili, aŭ ni devas fari preparon por plenumi gravan taskon en nia fronto.” “Kian grandan taskon?” tria lin interrompis. “Ĉu ataki Kunming, aŭ tuj transpasi Ginŝa-riveron konkure kun la malamiko?” Post tio ĉiuj eksilentis kaj direktis sian rigardon al mi. “Ricevinte neniun instrukcion de la supera instanco,” mi diris, “kiu do scias kion ni faros.”

Posttagmeze, kiam la preparado estis preskaŭ finita, kompanianoj du- aŭ tri-ope venis al mi kaj demandis, kial ni ankoraŭ ne ekiras. La demandoj des pli intensigis mian malpaciencon. Mi do decidis eliri por akiri informojn.

Tiu vilaĝo kun ĉ. tricent familioj estis sufiĉe granda. Pajlaj kabanoj kun bambuaj ĉirkaŭbariloj kaj verdaj rizkampoj en la ĉirkaŭaĵo aspektis tre kvietaj. Ankaŭ ĝiaj popolanoj vivis tre mizere, sed iom pli bone ol tiuj en Gujĝoŭ. En ĝi loĝis nemalmultaj nacimalplimultanoj. Sed pro trompa propagando de Kuomintango, preskaŭ ĉiuj ĝiaj junaj viroj kaj virinoj jam forfuĝis. Mi trovis mapon de Junnan-provinco inter paperpecoj kirliĝantaj en vento antaŭ la elementa lernejo kaj ĝin prenis kun ĝojo. Antaŭe en batalado ni estis direktataj de superuloj kaj kondukataj de voĵgvidantoj kaj havis nenian mapon por nin orienti. Kvankam la mapo estis simpla, tamen ĝi ja povis iom nin helpi. La mapo montris, ke ni nepre devas transpasi Ginŝa-riveron por marŝi norden. La rivero estis bone gardata de la malamikoj, kaj se ni ĝin transpasos perforte, certe okazos granda batalo.

Kiam mi preterpasis la pordon de la centra oficejo, mi vidis ke oni iras tien kaj reen en hasto, kvazaŭ por kunveni. Kvankam mi vidis konatojn inter ili, tamen mi ne kuraĝis ilin ĝeni per demando. Ŝajnis al mi, ke aperis nova grava problemo sur la vojo de nia Longa Marŝo.

Antaŭtagmeze de la tria tago, mi informiĝis, ke la persekutantaj malamikoj pli kaj pli proksimiĝis al ni kaj jam preskaŭ formis sieĝan cirkon ĉirkaŭ ni, sed ni ankoraŭ ricevis nenian ordonon pri ekago. Ĉiuj fariĝis pli kaj pli maltrankvilaj. Je la tagmezo, mi subite rimarkis ke kuriero de la regimenta oficejo venas al nia kompanio, kaj mi tuj iris renkonte al li kaj deman-

dis: “Ĉu la regimentestro vokas nin?” “Kiel vi sciigis pri tio?” diris la kuriero. Tion aŭdinte mi certiĝis pri la vereco, kaj ĝoje ekiris al la regimenta oficejo tirante la politikan direktanton Li je la mano.

La ĉambro plenis je sidantoj. Krom Regimentestro Ĉen Geng kaj Politika Komisararo Song Ĵenkjong, tie troviĝis ankaŭ kelkaj konataj kaj nekonataj respondeculoj de la centra oficejo. En la ĉambro dense odoris tabako. Ŝajne tie iris kunveno. Kiam ni eniris, Regimentestro Ĉen diris ordone: “La Centra Komitato decidis, ke nia armeo marŝu norden por transpasi Ginŝa-riveron², kaj asignis al nia regimento la taskon de kaptado de la pramejo Giaŭĉedu. Ni decidis uzi la duan batalionon kiel pioniran taĉmenton kaj vian kvinan kompanion kiel avangardon. Via tasko estas kapti la pramejon kiel eble plej rapide je ĉia ajn kosto kaj ŝirmi la sekvantajn trupojn transpasi la riveron. Fininte preparadon vi tuj ekiru!” Tion dirinte, li aldonis montrante iun kamaradon en nigraj vestoj apud li: “La Centra Komitato asignis laboran grupon por plenumi la taskon kune kun vi, jen estas la grupestro Kamarado Li.” Tion aŭdinte mi sentis neesprimeblan ĝojon, tuj firme manpremis kun Kamarado Li, iom interkonsiliĝis kun li pri la tempo de ekiro kaj revenis al nia kompanio.

Mi faris mobilizon al la trupo, kaj ni ĉiuj malmultigis niajn kunportatajn ŝarĝojn, sate manĝis kaj poste ekiris laŭ vojeto kondukanta al Ginŝa-rivero. Mi kaj Vicbatalionestro Huo Hajjuan iris post la avangarda plotono kaj la politika direktanto kaj la labora grupo iris ĉe la fino de la trupo. Post la brilaj bataloj ĉe Zunji kaj Tuĉeng, ĉiuj de nia kompanio havis tre altan batalvolon, kaj post refreŝigo de siaj fortoj dank’ al dutaga ripozo kaj ricevinte la rolon de avangarda kompanio de la pionira taĉmento por transpaso de la rivero, ili fariĝis ankoraŭ pli energioplenaj. Kvankam la montvojo estis tre kruta, iam ni iris eĉ laŭ neniuj vojoj kaj ĉiuj ŝvitegis sub la bruliga suno, tamen neniuj estis postlasita nek grumblis pro la peniga irado. Ni marŝis tutan nokton kun rapideco de pli ol kvin kilometroj en ĉiu horo. Post la elkrepuskiĝo, ni ripozis 10 minutojn, prenis iom da malvarma manĝaĵo,

trinkis iom da malvarma akvo, kaj poste marŝis haste ĉ. 40 kilometrojn en unu spiro.

Post kiam ni transiris montegon kaj estis nur je 30 kilometroj for de Ginŝa-rivero, ni decidis iom ripozi. Utiligante tiun horon, Kamarado Li de la labora grupo kaj ni interkonsiliĝis pri kaptado de la pramejo kaj decidis, ke atinginte la riverbordon ni unue ekstermu la gardantajn malamikojn kaj poste perforte transpasu la riveron per kaptitaj ŝipoj. Venkinte aŭ eksterminte la gardantajn malamikojn sur la kontraŭa bordo, ni devas firme gardi la pramejon por ke la sekvantaj trupoj sekure transpasu la riveron.

Kiam ni proksimiĝis al la rivero, la suno jam subiris. Longa ĉeno de montoj en malproksimo nigre siluetiĝis kaj oni ne povis klare vidi la arbojn kaj rokojn sur ĝi. Antaŭ la montoj Ginŝa-rivero etendiĝis kiel rubando de griza tolo kaj oni ne povis distingi la fluon de la plaĝo. Ĉe la kuniĝa ejo de la montoj kaj rivero jam brilis palpebrumantaj lampoj, kvazaŭ okuloj de la malamikoj nin observantaj. Kiu sciis, ĉu la malamikoj jam rimarkis nin aŭ ne? Eble ili jam atendis nin? Se tiel estus, ni povus provi nian forton kontraŭ ili. Tiel pensante ni jam proksimiĝis al la riverbordo. Mi donis ordonon al la sekvantoj: "Ginŝa-rivero estas antaŭ ni, pretiĝu por batalo!"

En la mallumo, la estro de la unua avangarda plotono subite kuris al mi kaj spiregante raportis al mi pri la situacio.

Post kiam ni eniris en Junnan, la malamikoj timis, ke ni transpasos Ginŝa-riveron neatendite, tial en la lastaj tagoj ili movis trupojn al la kontraŭa bordo, metis sub sia regado ĉiujn grandajn kaj malgrandajn pramejojn en gardlinio longa je centoj da lioj, forkaptis ĉiujn ŝipojn al la kontraŭa bordo kaj ĉesigis la trafikadon ĉe ambaŭ bordoj. La malamikoj sur la kontraŭa bordo ĉe Giaŭĉedu eĉ sendadis alivestitajn spionojn ĉi tien por esplorado. Oni ne sciis, kien la hodiaŭ venintaj spionoj iris por kaŝe fumi opion aŭ ĉantaĝi popolanojn, kaj la du ŝipoj, kiuj alportis ilin, atendadis ĉe la bordo. Kiam la skolta grupo de la avangarda trupo venis al la riverrando, iu ŝipisto misprenis ilin por la spionoj kaj demandis malhaste: "Ĉu vi revenis?" La skoltoj respon-

dis sagace: "Jes!" Kaj ili tuj saltis al li direktante siajn pafilojn al la brustoj de la ŝipistoj. Kaj tiamaniere ni kaptis la du ŝipojn kun iliaj ŝipistoj.

Aŭskultinte la raporton de la plotonestro, ni rapidis al la riverbordo, unue konsolis la timtremantajn ŝipistojn kaj poste petis informon de ili pri la stato de la kontraŭa bordo. La urbeto sur la kontraŭa bordo estis negranda, en ĝi estis impostejo kaj ĉ. 40 membroj de la packonserva trupo kaj en la mateno de tiu tago alvenis kompanio de regula armeo kaj loĝiĝis ĉe la dekstra flanko de la urbeto. Ĉe la meza parto de ĝi troviĝis apud la rivero kajo kun ŝtona ŝtuparo. Sur la kajo ordinare gardstaris unu soldato de la packonserva trupo kaj pro la streĉa situacio en la lasta tempo aldoniĝis alia gardanto. Kvanke la malamikoj timis, ke la Ruĝa Armeo transpasos la riveron, tamen ili opiniis, ke la pramejo ne estas ĉefa kaj cetere la Ruĝa Armeo ne povas alveni tiel rapide, tial ilia gardado ne estis tre serioza.

Mi interkonsiliĝis kun la vicbatalionestro kaj decidis tuj transpasi la riveron. Persvadite de la politika direktanto la ŝipistoj, kiuj estis ofte ofenditaj kaj turmentitaj de la malamikoj, tuj konsentis veturigi nin trans la riveron.

Mi ordonis, ke la unua kaj dua plotonoj unue transpasu la riveron kune kun mi kaj la vicbatalionestro kaj la politika direktanto restu kune kun la labora grupo sur la bordo. La tria plotono estis ordonita stari batalprete sur la bordo kaj tuj nin helpi per pafado, se tio estos necesa.

La tria plotono disiĝis laŭlonge de la griza plaĝo kaj celis siajn pafilojn al la urbeto kun palpebrumantaj lamplumoj. Mi kun la unua kaj dua plotonoj senbrue iris sur la du ŝipojn, diris al la kamaradoj kiel oni agu post surbordiĝo kaj je urĝa okazo, kaj la du lignaj ŝipoj forlasis la bordon unu post la alia.

Ventetis tiunokte, kaj la ŝipoj balanciĝis senĉese pro ondoj. Kelkaj el ni helpis la ŝipistojn en remado kaj la ceteraj firme tenis siajn pafilojn en la sino, por ke levitaj akveroj ne malsekigu ilin.

Ni pli kaj pli proksimiĝis al la kontraŭa bordo kaj jam povis vidi la silueton de la urbeto. Iom pli poste, la lamplumoj el la fenestroj fariĝis ankoraŭ pli helaj kaj ni vidis tiam kaj tiam siluetojn kaj aŭdis kriojn de homoj. Baldaŭ intensa batalo okazos, kaj tio streĉis mian koron. Mi tiam firme tenis la pistolon enmane kaj fiksrigardadis la urbeton.

La ŝipoj albordiĝis. Mi puŝetis la antaŭe asignitajn du kamaradojn apud mi kaj la lastaj tuj surbordiĝis tenante siajn pafilojn kaj rapide iris supren laŭ la ŝtona ŝtuparo. Apenaŭ ili atingis la lastan ŝtupon, iu malamiko kun raŭka voĉo de junnan-ano demandis: "Hej! Kio okazis al vi, ke vi revenas nur nun!" La du kamaradoj ne respondis kaj baldaŭ aŭdiĝis severa krio de baso: "Ne moviĝu!" Tion aŭdinte, mi tuj kun la aliaj kamaradoj kuris supren kaj kaptis la du malamikajn gardstarantojn.

Mi mallonge pridemandis la kaptitojn kaj iliaj respondoj estis samaj kiel la vortoj de la


ŝipistoj. Mi tuj ordonis, ke la unua plotono iru dekstren laŭ la strato por ataki la regulan trupon kaj la dua plotono iru maldekstren por ataki la packonservan trupon, kaj ke ili raportu al mi la disvolviĝon de la situacio laŭ bezono.

La du ŝipoj sin turnis al la alia bordo por transveturigi sekvantajn trupojn.

Laŭplane la kuriero kolektis herbojn kaj ekbruligis fajron sur la bordo, por raporti per tiu signalo ke nia kompanio jam transpasis la riveron. Baldaŭ jam ekflamis la fajro ĵetante balanciĝantan ruĝan lumon sur la rivero.

Apenaŭ la signalo estis farita, pafoj aŭdiĝis sur la strato. Sed tuj silento denove englutis ĉion. Kio okazis? Se batalo jam komenciĝis, kial denove kvietiĝis? En tiu maltrankviliga momento alkuris unu post la alia la kurieroj de la unua kaj dua plotonoj.

Okazis jene: Kiam la unua plotono atingis la pordon de la malamika kompanio, la gardsta-



La pramejo Giaŭĉedu, kie la Ruĝa Armeo transpasis Ginja-riveron siatempe.

ranto demandis: “Kiu?” La kaptitoj tuj respondis laŭ nia ordono: “Viaj kolegoj! El la packonserva trupo.” Antaŭ ol la gardstaranto faris alian demandon, niaj soldatoj jam sin ĵetis al li kaj kunpremias lian gorĝon. Post demando pri la situacio, la tuta plotono tuj iris en la korton, malfermis la ĉambropordojn per piedbato kaj laŭte kriis: “Morton al kontraŭstaranto!” La ĉambroj plenis je fumo — la malamikaj soldatoj estis fumantaj opion kuŝante ĉirkaŭ lampeto. Aŭdinte la krion, tiuj “herooj” stultiĝis kun levitaj kapoj en la komenco kaj poste malrapide levis siajn manojn kaj diris konsternite: “Ni ĵus alvenis hodiaŭ. Ne miskomprenu!” “Trankviliĝu!” diris nia soldato. “Nenia miskompreno! Ni estas ruĝarmeanoj kaj venas ĝuste por serĉi vin!” Kaj tiuj “herooj” senhelpe rigardis unu alian kaj kolektiĝis antaŭ brilaj bajonetoj en la korto. Nur la kompaniestro kaj kelkaj aliaj oficiroj de la malamika trupo, kiuj estis en alia ĉambreto, rimarkis la malfavoran cirkonstancan kaj forfuĝis farinte kelkajn pafojn. Ne konante la vojojn en la malluma nokto ni ne postkuris ilin.

La dua plotono faris preskaŭ same. Ĝiaj membroj ŝajnis sin impostopagantoj kaj sukcesis iri en la domon de la packonserva trupo. La membroj de la packonserva trupo estis aŭ fumantaj opion aŭ ludantaj kartojn kaj ĉiuj, inkluzive de la trupestro, estis kaptitaj de ni tre facile.

Bone! Ĉio iris glate. Mi ĝoje ordonis, ke la kuriero bruligu grandan fajron sur la bordo por doni la duan signalon.

La pramejon ni facile kaptis kaj mi sentis min kvazaŭ liberiĝinta de pezega ŝarĝo. Kiam mi iris sur la ŝtonplatan straton de la urbeto kaj rigardis al la domoj en mallumo, mi tuj sentis soifon, acidan doloron en la kruroj kaj grumbladon de la stomako kaj deziregis tuj trovi lokon por sate manĝi kaj bone dormi. Kiam mi estis intencanta interkonsiliĝi kun la politika direktanto pri nia dua paŝo, la vicbatalionestro venis al mi kaj diris: “Por firmigi la pramejon kaj vastigi la okupitan areon, la regimentestro ordonis, ke vi marŝu antaŭen 7.5 km. laŭ la montvojo al Hujli kaj stari tie en batalpreteco.”

La trupo tuj kolektiĝis sur la strato. Ĉiuj esprimis ke ili povas persiste daŭrigi la marŝadon. Sed pro terura malsato, ĉiuj fariĝis senfortaj. Natura estis la malsatego, ĉar ni ja marŝis pli ol cent kilometrojn kaj manĝis nur malmulte da malvarma manĝaĵo. Sed ni ne havis tempon por prepari manĝaĵon, kaj verŝajne tie ne estis restoracio, do ni povis nur pene elteni la malsaton. Eklevinte la kapon dum irado mi subite rimarkis ŝildon ĉe la pordo de iu domo, kaj povis neklare vidi ke ĝi estis vendejo de farunaj frandaĵoj. Mi puŝmalfermis la pordon, eniris en la malluman domon kaj vokis plurfoje la mastron, sed neniu respondis. Eble aŭdinte la pafojn la dommastro forfuĝis pro timo. Bruliginte la olean lampon mi trovis, ke sur la bretaro estas nemalmulte da loke faritaj farunaj dolĉaĵoj. Mi pensis, ke ni devas mem fari la vendadon. Ni kolektis la biskvitojn kaj bombonojn, entute pli ol 15 kg. kaj la pli ol 100 membroj de nia kompanio ricevis po ĉ. 15 g. Iuj el ni tuj ĝin enstomakigis per kelkaj glutoj kaj diris viŝinte la buŝon: “Aj! Tro malmulte, mi eĉ ne konis la guston!” “Ne estu tro avidema. Se vi ne estus en la avangarda kompanio, ĉu vi povus manĝi tian bongustaĵon?”

Fininte la “manĝon”, la proviantisto kalkulis la koston, pakis arĝentajn monerojn, skribis noton sur paperslipo, zorge ilin metis en tirkeston de la kontista tablo kaj post blovestingo de la lampo, fermis la pordon kaj la trupo ekmarŝis.

Elirinte el la urbeto, ni suriris montvojon etendiĝantan en la maldekstran valon. Ni iris ĉ. 8 kilometrojn laŭ tiu ŝtona vojo, vidis en fronto relative ebenan lokon kaj decidis tranokti tie. Ĉiu subplotono sendis kelkajn homojn por kolekti brullignon, boligi akvon kaj prepari manĝaĵon, kaj ĉiuj aliaj dolĉe endormiĝis tenante la pafilon en la sino.

En horo, mi ne sciis kiam, mi vekiĝis forte skuite de iu mano. Malferminta la okulojn mi vidis, ke la vicbatalionestro venis al ni. Li diris haste: “Kompaniestro Hiaŭ, tuj leviĝu kaj antaŭen marŝu plu!” Mi surpriziĝis, kaj tuj leviginte demandis: “Ĉu io okazis?” Montrante al la silueto de malproksima montego li diris: “Se vi iros 20 kilometrojn laŭ tiu ĉi vojo, vi

Taj-a maljuna ŝipisto (la kvara de dekstre), kiu remis ŝipon por la Ruĝa Armeo, rakontas al gejunuloj kiel sagace la Ruĝa Armeo transpasis Ginŝa-riveron sistempe.



atingos la supron de la monto. Se la malamikoj okupas tiun lokon, ili forte minacus nin de la alta pozicio. La regimentestro ordonis, ke ni nepre okupu tiun lokon antaŭ la elkrepuskiĝo por pli vastigi la okupatan areon kaj pli firme teni la pramejon.” Mi demandis dubeme: “Unu tago sufiĉas por ke nia regimento kaj la estroj de la centraj organoj transpasu la riveron, kial do firme tenadi la pramejon?” La vicbatalionestro ekridetis kaj diris: “Tamen ne tiel simple estas; nun miloj kaj miloj da homoj de la ĉeforto transpasos la riveron ĉi tie.” “Kio?” mi demandis. “Ĉu ĉiuj de la Unua kaj Tria Armegrupoj transpasos ĉi tie?” “Jes! Jes!” kapbalancadis la vicbatalionestro. Ho, nun mi komprenas, ke la estroj haste kunvenis antaŭ nia ekmarŝo, kaj Vicprezidanto Ĝoŭ maldormis tutnokte kaj pridemandis la staton de nia kompanio ja ne nur pro aktivado de la Centra Taĉmento, sed pro aktivado de la tuta armeo. Tiu penso ekscitis min kaj samtempe mi sentis la pezecon de la tasko sur la avangarda kompanio de la tuta armeo. Mi tuj kunvenigis la plotonestrojn kaj ordonis, ke oni rapide manĝu kaj pretiĝu por ekmarŝo.

Vekite el la dormo kaj informiĝinte ke ni devas tuj ekiri, iuj el ni iom malĝojiĝis. Sed post kiam la politika direktanto klarigis la signifon de la okupo de la montpinto kaj firma teno de la pramejo, ĉiuj tuj entuziasmiĝis. Iu laŭte diris: “Ni marŝu persiste 20 kilometrojn kaj tranoktu sur la montsupro!” Tiam ĉiuj ekkriis kun: “Ni okupu la montsupron por ŝirmi la transpasantajn trupojn!” “Ni sturmu la montsupron kaj garantiu sekuran transpason de la tuta armeo!” Kaj poste ĉiuj urĝigis la kuiristojn rapide pretigi la manĝaĵon, por ke ili povu frue ekmarŝi post manĝado. Kaj tiam la laco kaj malsato tute malaperis.

Je la tagiĝo, ĉiuj atingis la montsupron ĝustatempe, kvankam jam tre tre lacaj. Rigardante malproksimen de sur la montsupro, ni vidis ke sennombraj montetoj staras sube kaj inter ili serpentumas la vojeto kondukanta al Hujli. Ni decidis okupi la du montetojn ambaŭflanke de la vojeto en malproksimo kiel poziciojn por regi la unikan vojon de Hujli al la pramejo.

Nia trupo plue marŝis antaŭen al la montetoj. Subite la avangarda subplotono alarmis pri apero

de malamiko. 20 minutojn post malgranda batalo, alvenis grandaj trupoj de la malamiko.

Vere saĝa estis la komando de la supera instanco. Kiel grandan perdon ni devus suferi, se ni tranoktus hieraŭ en la valo.

Ne konante la situacion, la malamikoj ne kuraĝis ataki nin, kaj ankaŭ ni ne faris atakon. Tiamaniere la du flankoj staradis unu kontraŭ la alia. Ĉirkaŭ la kvara horo posttagmeze, la kvara kompanio kaj la mitrala kompanio de la speciala bataliono venis al ni. Fronte de la kolono iris kelkaj homoj. Ni alproksimiĝis al ili kaj vidis, ke ili estas Regimentestro Ĉen Geng kaj Politika Komisaro Song Ĵenkjong. La estroj evidente tre ĝojis kaj nin vidinte tuj diris: "Vere bravaj vi estas!" Raportante al la estroj pri la malamikoj, mi akompanis ilin fari inspektadon al la pozicio.

Post kelkaj minutoj, la regimentestro kunvokis nin kaj la kadrojn de la kvara kompanio kaj la mitrala kompanio por disdoni taskojn. Li ordonis nian kompanion fari ofensivon de sur la dekstra montpinto kontraŭ la malamikoj dekstre de la vojo; la kvara kompanio faru ofensivon de sur la maldekstra montpinto kontraŭ la malamikoj maldekstre de la vojo; la mitrala kompanio ŝirmu la atakantojn per siaj kvar maŝinpafiloj sur la du montpintoj; post venko super la malamikoj, ĉiuj ilin persekutadu ĝis ricevo de ordono pri ĉesigo.

Sub la unueca komando de la regimentestro, la mitraloj komencis pafi. Kiam aŭdiĝis sturma klarionado, nia tuta kompanio tuj kuris antaŭen. Kurante ni pafadis al la malamikoj, kaj baldaŭ devigis ilin retiriĝi. La teruritaj malamikaj soldatoj diskuris panike ĉie en la montaro. Ni kuris ĉ. dek kilometrojn en unu spiro. Iuj el la malamikoj estis mortigitaj; aliaj, kiuj ne povis kuri rapide, kuŝiĝis ŝajnigante sin mortintoj; triaj falis en hasta kurado de sur krutaĵo kaj mortis. Kiam ni atingis monton post iu vilaĝo, ni ricevis de rajdanta kuriero ordonon de la regimentestro: "Ĉesu persekuti kaj tranoktu ĉeloke en batalpreteco."

La trupo estis kondukita sur la montodeklivon post la vilaĝo por tranokti. Vere jam tute el-

ĉerpiĝis niaj fortoj. Sidiĝinte ni jam ne povis nin levi kaj eĉ neniu el ni plendis pro malsato kaj soifo.

Je la vesperiĝo, subite ĉiuj ekkriis kaj kuris malsupren. Mi ekrigardis kaj vidis, ke iu trupo preterpasas la monton kaj ĝia antaŭiranta parto jam proksimiĝas al la vilaĝo ĉe la montpiedo kaj senfina kolono ĝin sekvas. Ĉar niaj kamaradoj antaŭe jam informiĝis, ke la trupoj de la Tria Armegrupo preterpasos, tial ili leviĝis el dormo kaj kriadis por saluti kaj bonvenigi la preterpasantojn, tute ne zorgante, ĉu la lastaj povis klare aŭdi la konfuzajn kriojn aŭ ne. La laco pro la longa persekutado denove estis tute forgesita.

En la sekvanta tago, la estroj de la Centra Komitato kaj la laborantoj de la centra oficejo ĉiuj jam transpasis la riveron kaj loĝis en la vilaĝo kiun ni trapasis en persekutado. Ankaŭ nia tuta regimento jam sekure atingis tiun lokon. Mi informiĝis de poste-veninto, ke la Unua Armegrupo ne povis transpasi la riveron ĉe la pramejo Longgiedu pro tio, ke tro larĝa estas la rivero en tiu loko kaj eble okazos ĝenado de malamikaj aeroplanoj, kaj la Tria Armegrupo ne povis transpasi ĉe la pramejo Hongmendu pro tio, ke la fluo en tiu loko estas tro rapida, kaj ambaŭ ili transpasis la riveron ĉe la pramejo Giaŭĉedu. Post tio la Tria Armegrupo ekmarŝis al Hujli laŭ vojo en la maldekstra flanko.

1. La Konferenco de Zunji estas plivastigita konferenco de la Politika Buroo de CK de la Komunista Partio de Ĉinio okazigita en Zunji de Gujĝoŭ-provinco en januaro de 1935. Pro la gvido de la tria "maldekstra" oportunisma linio en la Partio, la Centra Ruĝa Armeo ne povis frakasi la kvinan "ĉirkaŭekstermon" de la kuomintang reaktiularo kaj devis forlasi la Centran Revolucian Bazon en oktobro de 1934 kaj fari la Longan Marŝon. Sub blokado kaj persekutado de la malamikoj, la Ruĝa Armeo plurfoje falis en danĝeron kaj ricevis grandajn perdojn. Por savi la Ruĝan Armeon kaj la revolucion aferon de Ĉinio, okazis tiu konferenco dank' al rezoluta luktado de Kamarado Maŭ Zedong kaj aliaj. Subtenate de la plimulto de la kamaradoj, la konferenco senigis la "maldekstrajn" oportunistojn je iliaj gvidaj pozicioj kaj starigis la gvidan pozicion de Kamarado Maŭ Zedong en la tuta Partio. Kaj post tio, la Ruĝa Armeo venke marŝis antaŭen sub la gvido de Kamarado Maŭ Zedong kaj fine atingis la revolucionan bazon de norda Senhi.

2. Ĝinŝa-rivero estas supra parto de Jangzi-rivero. La pramejo Giaŭĉedu, kie la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo transpasis la riveron, troviĝas en norda parto de Junnan-provinco.

Miliono da ĉinaj kadroj iris al la agrikultura fronto

EN la arda tajdo de “lerno de Daĝaj en agrikulturo”, pli ol miliono da kadroj de nia tuta lando iris al la agrikultura fronto por tie studi revolucion teorion kaj reformi la naturon kune kun komunumanoj.

Lastatempe mi vizitis Hebej, Ŝandong kaj Henan, gravajn provincojn de la ĉina agrikulturo. Ĉu en la regiono de Tajhang-montaro aŭ sur la ebenaĵo de norda Ĉinio, ĉie min profunde impresis la kuna batalado de kadroj kaj amasoj en intimaj rilatoj de samfamilianoj. Tie plejparto de la kadroj de la provincoj, subprovincoj kaj gubernioj jam iris al kamparo kaj nur malmultaj laboras en la oficejoj.

Laŭ la nekompleta statistiko de dekelkaj provincoj, en la pasinta jaro la nombro de la diversnivelaĵoj kadroj, kiuj iris al la agrikultura fronto por gvidi produktadon kaj partopreni en fizika laboro, atingis pli ol milionon. Iris al la agrikultura fronto pli ol 80,000 kadroj de Hebej kaj po pli ol 100,000 de Henan kaj Ŝandong. En la provincaj kaj subprovincaj oficejoj de Hebej kaj subprovincaj oficejoj de norda Henan kaj okcidenta Ŝandong efektiviĝis en la lastaj jaroj sistemo, ke triono de la kadroj restas en oficejoj por zorgi ĉiutagajn laborojn, alia triono iras al partiaj lernejoj por studi marksisman-leninisman teorion kaj al bazaj unuoj por fari enketadon kaj la cetera triono iras al la kamparo por tie partopreni en fizika laboro kaj gvidi produktadon. Kaj la tri partoj alternas periode.



Granda nombro da kadroj el provincaj institucioj de Ŝandong sub la direktado de la gvidantoj de la provinca partia komitato iras al agrikultura fronto.

En tiuj regionoj multaj veteranaj kadroj, kiuj batalis kaj samtempe okupiĝis pri agrikulturo dum la jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito, nun sin montras plenaj je revolucia entuziasmo kiel antaŭe. Ili reformas la naturon kune kun komunumanoj kaj kontribuas siajn fortojn por konstrui socialisman kamparon kaj krei produktan rekordon de agrikulturo. Sun Guodong, la unua sekretario de la partia komitato de Handan-gubernio de Hebej estas reprezentanto de miloj kaj dekmiloj da tiaj veteranaj kadroj. Li aĝas 51 jarojn kaj partoprenis en la revolucio jam en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Tiam li batalis kune kun tieaj amasoj kontraŭ la japanaj agresantoj, disvolvis produktan movadon kaj havis kun ili familianan rilaton. Post la Liberiĝo li faris gvidan laboron en partiaj komitatoj de iuj el la tieaj gubernioj. En 1970,

kiam li estis transpostenigita de apuda gubernio al Handan por labori kiel la unua sekretario de ĝia partia komitato, li alportis kun si ŝpaton, falĉilon, ŝovelilon kaj pioĉon. Kiel ajn okupata li estas, li ĉiam elpremis tempon por iri al produktaj brigadoj por tie fari enketadon kaj partopreni en produktado. En la lastaj jaroj li ĉiujare fiziklaboris en kamparo pli ol 70 tagojn. Dank' al la ekzemplodono de Kamarado Sun Guodong la diversnivelaĵoj de Handan alterne fiziklaboras sur la agrikultura fronto kaj tio jam fariĝis sistemo.

En Hinhiang-subprovinco de Henan, kiu situas sur la norda bordo de la Flava Rivero, estas 14 gubernioj. En la lastaj jaroj, la 77 sekretarioj de partiaj komitatoj de ĝiaj gubernioj iris en plejparta tempo al produktaj brigadoj por fari enke-

Gvidantaj kadroj de Lihian-gubernio planas kune kun maljuna kamparano-teknikisto pri la montregiona konstruado.




tadon kaj fiziklaboron. En tio Hujhian-gubernio estas la plej bona ekzemplo. De post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio la kadroj sub la konduko de Ĝeng Jonghe, la unua sekretario de la gubernia partia komitato, ĉiam iras al la plej malfacilaj lokoj por tie fari plej lacigajn laborojn. Sub la gvido de la kadroj la popolo de la gubernio jam transformis malgrandajn parcelojn de la montregiono en ŝtuparajn kampojn, konstruis multajn akvorezervejojn, lagetojn kaj irigaciajn kanalojn sur montoj kaj arbarizis nudajn montojn. Dank' al tio la agrikultura produkto de Hujhian impete disvolviĝis. En 1974 kvankam sekeco damaĝis la lokon, tamen ĝia hektara produktokvanto de greno estis 2.4-oblo de tiu de 1965, la jaro antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio. En 1975

ĝia produktokvanto de somera greno estis 1.5-oblo de la totala produktokvanto de greno de 1965.

En Liaŭĉeng-subprovinco de Ŝandong-provinco, kiu estis ofte atakata de naturaj katastrofoj, la agrikultura produkto estis malalta kaj nestabila en la pasinteco. En la lastaj jaroj ĝiaj diversnivelaĵaj partiaj komitatoj sendis grandan nombron da kadroj al produktaj brigadoj por ke ili tie kaj faru fizikan laboron kaj gvidu la amasojn en batalo kontraŭ sekeco, inundo kaj alkalo. Dank' al fosado de putoj, konstruado de irigaciaj kanaloj kaj multa bredado de porkoj por pliigi sterkon, oni multe fortigis la rezistan povon kontraŭ naturaj katastrofoj kaj havigis al si bonan rikolton de agrikulturo en la tuta subprovinco.

Li Ajhu (fronte meze), sekretario de la Ŝoŭĵang-gubernia Komitato de KPC en Ŝanhi-provinco, laboras kune kun komunumanoj por transformi riveron kaj konstrui kampon.





*Jang Guj (meze),
sekretario de la
Linhian-gubernia Ko-
mitato de KPĈ en
Henan-provinco, kaj
baza kadroj kune
laboras en kamparo.*

Post kiam Liu Kingŝan, la unua sekretario de la partia komitato de Ginhian-gubernio de Hebej, iris al kamparo por partopreni en fizika laboro, li ĉiutage ellitiĝis antaŭ elkrepuskiĝo. Tage li laboris kune kun komunumanoj surkampoj kaj nokte li laboris ĝis malfrua horo. Foje dum kampokonstruado li transportis en unu tago pli ol 90 ĉarojn da teraĵo, pli multe ol ordinara komunumano. La komunumanoj ĝoje diris: “Nia sekretario faras saman laboron kaj prenas saman manĝon kun ni kaj montras nenian sinjorecon.”

Ĉiujare la guberniaj kaj komunumaj kadroj de la gubernioj Hijang de Ŝanhi kaj Vubu de Ŝenhi fiziklaboras en kamparo 100 kaj 200 tagojn respektive. Ili diris kun profunda kompre-

no: “Partopreno de kadroj en kolektiva produkta fiziklaboro estas iniciatita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj granda afero koncernanta oponon kontraŭ kaj preventon de reviziismo. Nur en komuna laborado la kadroj povas starigi egalecan kaj intiman rilaton kun la amasoj. Nur se la kadroj partoprenas en produktado ili povas koni kaj direkti ĝin. Nur se la kadroj kunfandiĝas kun amasoj ili povas pli bone mobilizi la aktivecon de la lastaj en produktado.”

Nun sur la vasta teritorio de la tuta Ĉinio, de la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a revolucia bazo ĝis la Tibeta Altebenaĵo, de la ebenaĵo de nord-orienta Ĉinio ĝis Hajnan-insulo de suda Ĉinio diversnivela kadroj iris kun litaĵo al kamparo por fari fizikan laboron kaj enketadon kaj gvidi produktadon, kaj tio jam fariĝis nova moro.

Por konstrui socialismon rapide

— Pri labormodelo Li Linĝuang

ESTIS frua mateno. Ekspreso de Kantono al Pekino haltis ĉe la stacio de Ĝuĝou de Hunan-provinco. En litvagonon eniris mezaĝulo. Trovinte por si la lokon li tuj kuŝiĝis kaj baldaŭ endormiĝis. Multaj pasaĝeroj kun miro rigardis lin: “Kio okazis al li?”

Li estas labormodelo, komunisto Li Linĝuang de la maŝinfabriko Honghianggiang de Ĝuĝou. Nun li estas veturanta al Daking kiel membro de la vizita grupo de sia fabriko. Sed pasaĝeroj neniom scias, ke hieraŭ li laboris tutan nokton en la fabriko kaj forlasis la fabrikon nur antaŭ duonhor.

En pli ol 20 jaroj Li Linĝuang kiel mastro de la ŝtato sinforgese laboris kaj senĉese faris sian kontribuon al la socialisma konstruado de la patrio. Ĉiujare li superplenumis sian produktan taskon. En la unuaj 4 jaroj de la Kvara Kvin-jara Plano (1971-1975) ĉiujare li plenumis taskon por tri jaroj kaj du monatoj. En la pasinta jaro, kvankam lia tempo estis multe konsumita per ĉeestado de kunvenoj, tamen li ankoraŭ superplenumis sian labortaskon.

KAPTI ĈIUN SEKUNDON

Li Linĝuang ofte diras: “Por multe, rapide, bone kaj ekonomie konstrui socialismon ni devas kapti ĉiun minuton kaj sekundon.” En la pasintaj 20 jaroj li laboris ĉiam konscie kaj sinforgese, strikte ligante sian ordinaran laboron kun la granda komunisma idealo.

En 1960 la sovetuniaj reviziistoj rompis siajn promesojn, nuligis kontraktojn inter Sovetunio

kaj Ĉinio kaj revokis el nia lando siajn specialistojn. La akra internacia klasbatalo donis al Li Linĝuang profundan lecionon. Li komprenis el tio, ke lia laboro estas ne nur simpla produktado, sed ankaŭ politika batalo. Tiam lia fabriko estis provanta fari ian produktaĵon, kiun la imperiismaj landoj malpermesis liveri al ni. Li kaj la laboristoj de la tuta fabriko klopodadis tage kaj nokte, disvolvante la revolucionan spiriton de sinapogo sur propraj fortoj. Kvankam lia mano estis serioze vundita de la maŝino, tamen li daŭre persistis en laborado. Kiam oni konsilis al li ripozi, li respondis: “En batalado kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj kontraŭrevoluciaro, ĉiu sekundo estas valora por ni. Nun ni devas streĉe labori, sed ne ripozi.” Dank’ al la kolektiva klopodado, ili venkis malfacilojn unu post alia kaj sukcese provfabrikis la produktaĵon.

Post hardado en la Granda Proleta Kultura Revolucio socialisma aktiveco de Li Linĝuang fariĝis pli granda. Li ĉiam cerbumas kiel plene utiligi ĉiun sekundon por la revolucio. Antaŭe li manipulis nur 1 maŝinon. Li trovis poste, ke en prilaborado de unu maŝinpeco restas al li iom da libera tempo. Li do petis manipuli samtempe 2 maŝinojn. La du maŝinoj distancis unu de la alia ĉ. 8 metrojn kaj estis tre penige por li manipuli du maŝinojn. Gvidanto de la laborejo kore admonis lin: “Majstro Li, la laboro estos tro intensa, kaj vi laciĝos de tio.” Li Linĝuang respondis: “Tio ne gravas. Mi estas fortika. Mi provu.”

Li Linĝuang estas amatoro de longa kurado. Por adapti sian korpon al la laboro sur du ma-



ŝinoj, li plilongigis la distancon de sia kurado. Samtempe kun tio li pliraciigis sian manipulado. Post pluraj eksperimentoj lia imago efektiviĝis. Poste li mallongigis la tempon de aŭtomata tranĉado de 28 sekundoj ĝis 18, dank' al kio li rapidigis sian laboron je triono.

PLIBONIGI KVALITON PER TEKNIKA RENOVIGO

El multjara praktikado Li Lingguang konis profunde, ke por konstrui socialismon oni devas labori ne nur energie, sed ankaŭ saĝe. En la pasintaj pli ol dek jaroj li faris teknikajn renovigojn al la maŝinoj, kiujn li iam manipulis, plibonigis preskaŭ ĉiujn procedojn de produktado kaj fariĝis fama lertulo en teknika renovigo.

Ĉu en granda aŭ malgranda renovigo Li Lingguang ĉiam donas saman atenton. Antaŭe por prilabori dentradan kovrilon li bezonis 3 minutojn. Li rimarkis, ke la tri truoj sur la kovrilo formas simetrian triangulon kies bazo estas malpli longa. Antaŭe la borilo moviĝis laŭ la du lateroj, sed poste laŭ la bazo kaj unu el la du lateroj. Tiamaniere li povas ŝpari unu sekun-

don en prilaborado de ĉiu kovrilo. La gvidantoj kaj la kamaradoj laŭdis lian revolucionan spiriton "kapti ĉiun sekundon". Sed iuj mokis lin: "Por kio taŭgas unu sekundo?" Li Lingguang respondis: "Se guto al guto aliĝas, rivero fariĝas. Se en tri minutoj oni povos ŝpari unu sekundon, kiom da sekundoj ili akiros en unu jaro! Se ni ĉiuj tiel agos, kiom da produktaĵoj ni povos elfari!"

En teknika renovigo Li Lingguang tre atentis pri la kvalito de produktaĵoj. Foje li faris kelkajn subnormajn pecojn, por ripari ties ĉiun pecon li bezonis duonon da horo. Post pririgardo li trovis la kaŭzon de subnormeco, ke fiksilo estas ne tre bona. Li do renovigis la fiksilon, kaj dank' al kio li ne nur altigis la kvaliton de produktaĵoj sed ankaŭ reduktis ties tempon. Praktikado konigis al li: Nur post atingo de la bonakvalito, oni povas altigi rapidecon en produktado. De tiam, en teknika renovigo li ĉiamaniere strebis al alta rapideco surbaze de altigo de kvalito de produktaĵoj. En la lastaj du jaroj li boris pli ol 700,000 truojn sur pli ol 80,000 pecoj, kiuj ĉiuj estas normaj.

SINAPOGI SUR LA FORTO DE LA AMASOJ

En novembro de 1974 Li Lingguang aŭdis, ke iuj laborejoj havas malfacilon en plenumo de la jara tasko. Tiam li tre maltrankviliĝis, kvaŭ grandega ŝtono pezus sur lia brusto. Li pensis: La plano de industria produktado de la ŝtato estas plenumita de ĉiuj fabrikoj kaj la tasko de ĉiu fabriko povas esti plenumita dank' al diligenta klopodado de ĝiaj laboristoj. Post labordeĵoro li skribis leteron kun siaj opinio kaj propono al la partia komitato de la fabriko. La partia komitato akceptis la proponojn de li kaj aliaj veteranaj laboristoj kaj disvolvis en la fabriko socialisman konkurson. En tiu jaro la fabriko antaŭplenumis la ŝtatan taskon je kvar tagoj.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, Li Lingguang kaj la laboristoj kritikis la reviziismajn liniojn de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ

kaj la diron ke “amasoj estas estiĝintaj”, kaj pli profunde konis, ke “amasoj estas veraj herooj”. Li pensis: Socialismo estas komuna afero de milionoj kaj milionoj da popolanoj, ĉiu ajn, eĉ se li povos fari en unu jaro laborojn de dek jaroj, kio estas nur unu briko aŭ tegolo por la socialisma domo. Por rapidigi la konstruadon de la patrio, oni devas apogi sin sur la forto de amasoj. Tial Li Linĝuang ne nur mem laboras energie, sed ankaŭ kuraĝigas kaj helpas siajn kolegojn. Iu junulo en lia grupo ofte rompis borilojn en produktado kaj ne povis plenumi sian taskon. Li Linĝuang meminiciate helpis lin por altigi la teknikon kaj fine tiu akurate plenumis sian taskon. Veterana laboristo, komunisto Lu Juŝeng diligente ellernis por la revolucio plurajn produktajn teknikojn kaj ĉiam laboras tie, kie oni lin bezonas. Li Linĝuang mobilizis siajn grupanojn por lerni de Majstro Lu kaj disvolvis la aktivadon “klopodu por fariĝi multflanka lertulo”. Nun nemalmultaj laboristoj jam ellernis pli ol du produktajn teknikojn kaj superplenumis produktan planon en sinsekvaj jaroj.

La laŭdinda konduto de Li Linĝuang en la revolucio kaj produktado ne estas hazarda. Li devenis de familio de laborulo en montaro de Hunan-provinco. Post kiam li fariĝis laboristo, li donis aparte grandan atenton al studo de revolucia teorio kaj lia ideologia konscio altiĝis rapide. Frue en 1958 li jam faris proponon al la membroj de la Komunisma Junulara Ligo kaj la junuloj de la fabriko ke ili ne akceptu premion post superplenumo de la produkta tasko kaj multe kontribuu al la revolucio. Li kaj aliaj 5 laboristoj la unuaj rifuzis premion. Post kiam gvidanto de lia laborejo metis la monon sur lian maŝinon, per la premio li aĉetis muzikilojn kaj sportajn instrumentojn kaj abonis gazeton kaj ĵurnalon por la kolektivo. Li Linĝuang estis 12-foje elektita kiel avangarda produktanto kaj labormodelo, sed li neniam rigardis la honoron donitan de la popolo kiel sian kapitalon por ĉasi personan famiĝon kaj profiton. Li diris: “Ni estas mastroj de la ŝtato kaj ni laboras por la potenco de la patrio kaj efektivigo de komunismo, sed ne por nia persona famiĝo kaj profito.”

(Daŭrigo de P. 44)

hi, Gansu kaj Kinghaj kaj havas gravan signifon por racia utiligo de la akvoforto de la Flava Rivero kaj por akceli disvolviĝon de tieaj industrio kaj agrikulturo.

MULTFAKA ESPLORADO PRI LA KINGHAJ-TIBETA ALTEBENAJO

En 1975, grandskala multfaka esplorado sur la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo estis entreprenita de la Ĉina Akademio de Sciencoj, diverslokaj sciencaj institutoj, altaj lernejoj kaj sciencistoj de la koncernaj fakoj sub la Tibeta Aŭtonoma Regiono. La fakoj envolvitaj en la esplorado konsistis el geologio, geofiziko, geomorfologio, kvater-

naro, paleovertebruloj, paleoantropologio, tervarmo, glacirivero, terŝtona fluo, glitfalo de deklivo, natura geografio, zoologio, botaniko, grundo, klimato, agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, forcejo kaj hidraŭlika ekonomio, entute pli ol 50 sciencaj branĉoj. Oni akiris grandan kvanton da primara materialo. Ekzemple, en la norda piedo de Himalaĵoj oni trovis unufoje fosilion de kolonio de koraluloj en la kalkoŝtona tavolo de permio, kaj en la suda piedo de la montaro Ganggadesi fosiliojn de tripedfingra ĉevalo, hieno kaj rinocero en tertavolo de paleozoiko, kaj en Ningĉi fosiliojn de nombro da homaj ostoj el neolitiko inkluzive de malsupra makzelo kaj membraj ostoj.

DIZELA LOKOMOTIVO KUN ALTA KVALITO

La ĉefaj ekonomiaj kaj teknikaj normoj de la dizela lokomotivo “Dongfeng 4” kun 4,000 ĉevalpovoj, kiun produktas la Dalian-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko kaj kiu estas lanĉita en 1973, atingis avangardan nivelon. Kompare kun dizelaj lokomotivoj produktitaj de fremdaj landoj en sepdekaj jaroj, ĝia dekliv-grimpa kapablo estas bona. Trenante pasaĝeran vagonaron ĝi facile trapasis la fervojon kun la plej granda dekliveco en nia lando kaj trapasis la provadon de abrupta bremsado kaj rapida ekstarto sur deklivo. Ĝia laŭplana plej alta rapideco estas 120 kilometroj ĉiuhore kaj ĝi ne skuigis dum plenrapida kurado.



La Buji-oj

de ZONG MIN

LA buji-a nacieco nombras 1,370,000 membrojn, el kiuj plejparto loĝas en la Buji- kaj Miaŭ-nacieca Aŭtonoma Subprovinco en Suda Guĝoŭ kaj la aliaj dise en Anŝun, la Miaŭ- kaj Dung-nacieca Aŭtonoma Subprovinco en Sud-orienta Guĝoŭ kaj pluraj gubernioj nordokcidente de Guĝang.

La regiono loĝata de buji-oj kun absoluta alteco de 400-1,000 metroj oblikvas de nordo al sudo kaj apartenas al la Junnan-Guĝoŭ-a Altebenaĵo, sur kiu ondadas la montaro Miaŭling.

Buji-nacieco havas longan historion. Frue en la periodo de Militantaj Regnoj ĝis la fino de la Okcidenta Han-dinastio (475 a. K. - 8 p. K.) en la vasta areo kun la sudorienta parto de Guĝoŭ kiel la centro aperis regno Jelang, kies popolo konsistis ĉefe el buji-oj. En Kin-dinastio (221 a. K. - 207 a.K.) Jelang fariĝis parto de la provinco Hiang. Han-dinastio dividiĝis ĝin en kvar distriktojn kaj nomumis ŝtatajn oficistojn por regi ilin. De tiam multiĝis kontaktoj de la lokoj de buji-oj kun internaj partoj de Ĉinio. Sub la influo de hanoj rapide progresis la ekonomio de la buji-oj kaj iom post iom

stariĝis la feŭda produkta rilato en la loko.

La lokoj de buji-oj abundas je akvofontoj kaj diversaj produktaĵoj. Tie la ĉefaj grenoj estas rizo, tritiko kaj maizo kaj ankaŭ milio, sorgo, fagopiro, batato, fabo k. a. La ekonomiaj plantaroj inkluzivas kotonon, tabakon, ramion, sukerkanon, aleŭriton, olean kamelion, kolzon, teon k. a. Antaŭ la Liberiĝo subpremate de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo buji-oj vivis tre mizere. Ili ne havis politikan rajton kaj la ekonomio kaj kulturo longe restis en stagnado. Tiam malmultaj bienuloj okupis grandan kvanton da tero, dum la vasta amaso de malriĉaj kamparanoj havis malmulte da tero. Ekzemple antaŭ la Liberiĝo en la Vangmo-a Buji- kaj Miaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio la bienuloj, kiuj konsistigis 2% de la tuta loĝantaro de la gubernio, okupis tamen 80% de la tuta agraro, dum la malriĉaj kamparanoj, kiuj konsistigis 95% de la loĝantaro, havis nur 20% de la agraro. La bienuloj faris kruelan ekspluatadon al la kamparanoj per terrento, uzuro kaj servuto.

En la historio la vasta amaso de laborantaj buji-oj faris multajn batalojn kontraŭ la subpremado kaj ekspluatado de feŭdaj regantoj de ĉiuj dinastioj, la agresado de imperiistoj kaj la reakcia regado de Kuomintango. En la jaro 1797 buji-aj kamparanoj leviĝis al arma batalo por oponi la reakcian regadon de King-dinastio kaj la batalo envolvigis vastan areon de Junnan, Guĝoŭ kaj Guanghi. En 1854 buji-aj kamparanoj bonvenigis la trupon de la Tajping-a Ĉiela Regno kun Hong Hiukjuan kiel la ĉefo en sudan Guĝoŭ. En 1944 la buji-a popolo sin organizis kaj forte batis la japanajn agresantojn kiuj invadis sudan Guĝoŭ.

Frue en 1932, la organizo de la Komunista Partio de Ĉinio en Joŭgiang de Guanghi sendis kadrojn en la regionon de buji-oj por disvolvi tie revolucion laboron. En 1935, kiam la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo trapasis sudan Guĝoŭ en la Longa Marŝo, la buji-a popolo helpis ĝin per vojmontro kaj grenliverado kaj nemalmultaj buji-aj junuloj aliĝis al la Ruĝa Armeo. De la Kontraŭ-japana Rezistmilito ĝis la Liberiga Milito neniam ĉesis la arma batalo de buji-oj kontraŭ Kuomintango.

Post la Liberiĝo, en la regiono de la buji-oj rapide stariĝis popola reĝimo kaj venke plenumiĝis la Agrara Reformo. En 1956 laŭ la volo de la buji-oj la Centra Popola Registaro sankciis la fondon de la Buji- kaj Miaŭ-nacieca Aŭtonoma Subprovinco en Suda Gujĝoŭ kaj ankaŭ 6 aŭtonomaj gubernioj.

La Buji- kaj Miaŭ-nacieca Aŭtonoma Subprovinco en Suda Gujĝoŭ multe zorgis pri kulturo de nacimalplimultaj kadroj. En 1954 tie estis pli ol 4,600 naciminoritataj komunistoj, kaj en 1956 jam pli ol 12,900. En la Granda Proleta Kultura Revolucio la nombro de nacimalplimultaj komunistoj superis 29,000, kiuj konsistigas 51% de la tuta komunistaro de la subprovinco. Multaj el la buji-aj kadroj laboras kiel gvidantoj de la gubernioj, distriktoj kaj komunumoj kaj ludas gravan rolon en diversaj frontoj.

Dank' al plenumo de la principo **"preni grenon kiel ĉefĉeneron kaj ĉiufanke disvolvi diversajn entreprenojn"** kaj precipe dank' al profunda disvolvo de la amasa movado de **"lerno de Daĝaj en agrikulturo"** impete progresis agrikultura produktado en la buji-a regiono. En 1973 la produktokvanto de greno de la aŭtonoma subprovinco superis la plej altan nivelon en la historio kaj ĝi faris valoran kontribuon al la revolucio per vendo de pli ol 5,000 tunoj da superbezona greno al la ŝtato. En la regiono oni jam akiris riĉajn rikoltojn de agrikulturo en pli ol dek sinsekvaj jaroj kaj la produktokvanto de greno de multaj komunumoj kaj brigadoj grandskale kreskis.

Antaŭ la Liberiĝo, en suda Gujĝoŭ estis preskaŭ nenia industrio. Post la Liberiĝo tie jam fondiĝis

fabrikoj de ilmaŝino, elektro, kemisterko, cemento, kaŭĉuko, tekstilado, papero, agrikultura maŝino, brando, presado k.a. Ĉiam kreskas grandskale la procento de la produktovaloro de industrio en la totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo. En la pasinteco, en suda Gujĝoŭ la trafiko estis tre malfacila. Nun tie ne nur aŭtoj povas atingi plejparton de la gubernioj, komunumoj kaj brigadoj, sed ankaŭ la fervojoj de Gujĝoŭ ĝis Guanghi, de Hunan ĝis Gujĝoŭ, de Siĉuan ĝis Gujĝoŭ kaj de Gujĝang ĝis Kunming strikte interligas la regionon kun aliaj lokoj de la lando.

La regiono havas abundajn riĉfontojn de karbo, fero, zinko, antimonio, kupro, petrolo, asbesto, hidrargo k. a. Iuj el tiuj riĉfontoj estas ekspluatataj.

Ekde 1958, en la regiono de la buji-oj preskaŭ ĉiuj lernoagaj infanoj vizitis lernejojn. Post la Granda Proleta Kultura Revolucio la nombro de buji-aj lernantoj multe kreskis kaj multaj el la komunumoj kaj brigadoj fondis novajn mezajn kaj elementajn lernejojn. Krome la subprovinco kaj gubernioj starigis popolajn hospitalojn, kuracejojn kaj virinajn sanitarejojn kaj efektiviĝis koopera kuracado. Nun en la buji-a regiono la popolo ĝuas longan vivon kaj riĉajn rikoltojn.

En sia longa produktado kaj socia vivo la buji-oj kreis riĉajn kulturon kaj arton. Inter la popoloj cirkulas multaj buŝaj literaturaĵoj de rakontoj, fabloj, proverboj, poemoj k.a. La buji-oj emas kanti kaj danci. Post la Liberiĝo, en tradiciaj festoj aŭ en libera tempo post laborado ĉarmaj kaj simplaj kantoj ĉiam ŝvebas super

la lokoj koncentre loĝataj de buji-oj. La popolkantoj de la buji-oj kun riĉaj enhavoj alprenas variajn formojn inkluzive de solo, dueto, unisono kaj ĥoro. Iliaj muzikiloj estas surnao, luna gitaro, *sjaŭ-o* (speco de ĉina bambua fluto vertikale blovata), bronza tamburo k.a. La plej famaj el iliaj dancoj estas pri teksado kaj leondanco. La buji-oj ĝuas renomon pro siaj metiartaĵoj kiel kolorriĉaj kaj klar-desegnaj ŝtofoj vakse tinkturitaj, brodaĵoj, delikataj tradiciaj ŝtofoj kaj belaj matoj kaj bambuaj ĉapeloj.

La buji-a lingvo apartenas al la hana-tibeta lingvosistemo kaj estas parenca al la ĝuang-a lingvo. La ĝuang-a dialekto en norda Guanghi estas preskaŭ sama al la buji-a. Pro longa interkontakto kun hanoj multaj buji-oj scipovas paroli en la hana lingvo.

Buji-aj junulinoj





Amikeco ĉe Niloj

de VU HINMIN

LA fame konataj Blua Nilo kaj Blanka Nilo kuniĝas en la bela lando Sudano kaj daŭre torentas antaŭen. Iliajn bordojn tapiŝas verdaj herbejoj kaj zefiro balancas branĉojn de kokosarboj, la allogaj tropikaj pejzaĝoj estas neforgeseblaj, tamen des pli neforgesebla estas la nobla amikeco kaj frateco kiujn la sudanaj popolo kaj sportaj laborantoj montris al ni la sporta trejna grupo de Ĉinio dum nia laborado en la lando.

AMIKECO PLI LONGA OL NILO

Nilo, la plej granda rivero de Afriko, longas je 6,450 kilometroj kaj trafluas Ugandon, Sudanon kaj Egiption. En Afriko oni ofte prenas ĝin kiel simbolon de longeco. Kiam sudanaj popoloj kaj sportaj laborantoj renkontis ĉinajn amikojn, ili ĉiam emis diri: "La amikeco inter niaj du popoloj estas pli longa ol Nilo!" Jes, en la longa batalo kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj hegemoniismo, la popoloj de Ĉinio kaj Sudano ĉiam unuigis strikte, helpas sin reciproke kaj dank' al tio starigis inter si tre profundan kaj longan amikecon.

Kiam ni faris trejnadon en la provinco Kordofan de Sudano, la mastroj aparte aranĝis por ni viziton al la loka historia muzeo, kies kolektaĵoj atestis la gloran batalan

historion de la sudana popolo sub la gvido de la nacia heroo Mahdi en la brava rezistado kontraŭ fremdlandaj invadantoj dum la lastaj jaroj de la 19-a jarcento. Antaŭ ekspoziciataj lancoj kaj hakiloj, la mastroj aparte diris al ni: "Ĝuste per tiaj simplaj armiloj la sudana popolo mortigis ĉi tie la britan kolonian gubernatoron Gordon, kiu foje kruele subpremis en Ĉinio la revolucion movadon de la Tajpinga Ĉiela Regno kaj poste praktikis sangan regadon super la sudana popolo. Kaj tiu ekzekutisto, kies du manoj estis banitaj en la sango de la ĉina kaj sudana popoloj, ricevis sian meritan punon!"

Aŭdinte tiujn vortojn plenajn de batalpasio, ni ĉiuj estis tre emocii-taj kaj montris nian elkoran respekton al la sudana popolo kiu posedas gloran batal-tradicion!

PLIPROFUNDIĜO DE AMIKECO EN RECIPROKA SUBTENO

Hodiaŭ, en la nova bole leviĝanta tajdo de batalo, kiun entreprenas la diverslandaj popoloj de la tria mondo, kontraŭ la imperiismo kaj hegemoniismo, la sudana kaj ĉina popoloj pli strikte unuigis kaj kune batalas, subtenante unu la alian.

En la internaciaj sportaj organizoj, la sudanaj registaro kaj sportaj laborantoj ĉiam prenas justan pozicion por elpeli la t.n. "reprezentantojn" de Ĉiang-Kajŝek-a kliko kaj

redoni al Ĉinio la sidlokon laŭleĝe apartenantan al ĝi. Vicministro de la Kultura kaj Novaĵa Ministerio de Sudano Omar Salih Aisa, kiu respondecas pri junulaj kaj sportaj aferoj, esprimis en multaj okazoj: "En la mondo estas nur unu Ĉinio, kiu estas la Ĉina Popola Respubliko. Tiuj, kiuj solaj povas reprezenti la sportajn organizojn de Ĉinio, estas la Ĉina Tutlanda Sporta Federacio kaj la al ĝi apartenantaj asocioj de unuopaj sportbranĉoj." La Sudana Flugpilka Asocio faris klopodojn por restarigi nian laŭleĝan sidlokon en la Internacia Flugpilka Federacio, sendante leterojn al la flugpilka asocioj de Egiptio kaj aliaj landoj por kune proponi forpelson de Ĉiang-Kajŝek-a kliko el la nomita federacio.

La prezidanto kaj ĝenerala sekretario de la Sudana Flugpilka Asocio plurfoje montris, ke estas absurde ke la t.n. "reprezentanto" de Ĉiang-Kajŝek-a kliko uzurpas la sidlokon de Ĉinio en la Internacia Flugpilka Federacio, kaj esprimis ke ili batalos ĝisfine por nepre ŝanĝi tiun ekstrema malracian staton! Kiam venis la informo ke la laŭleĝa sidloko de Ĉinio en la Internacia Flugpilka Federacio estis restarigita, sudanaj amikoj ĝoje gratulis nin kaj diris prenante niajn manojn: "Ankaŭ nia venko estas tio."

SAME KIEL HEJME

Tiel en la ĉefurbo Kartumo kiel en la haveno Sudan ĉe la Ruĝa Maro, kien ajn ni iris, ĉiam multaj personoj intime mansignis al ni aŭ salutis en ĉina lingvo: "Bonfar-ton!" Kiam ni faris trejnadon en klubo, ĉiam multaj fervoraj sport-amantoj petis ekzerci kune kun ni por reciproke lerni unu de alia. Por estingi soifon dum trejnado, ofte sudanaj sportistoj ĝustatempe portis al ni trinkaĵon. Kiam ni marŝis sur strato, nekonataj ŝoforoj ofte varme invitis nin al sia aŭto por veturigi nin al la celloko. Ĉio tio profunde tuŝis la koron de ĉiuj kamaradoj de nia grupo, tiel ke ili diris: "Ni vivas en Sudano same kiel hejme!"

En la komenco de majo lastajare, al iu sudana tablotenisa trejnisto naskiĝis la unua infano, kiu havis dikajn vangetojn kaj grandajn okulojn. Vidante ĝin, ĉiu ajn ekŝatis, por ne paroli pri ĝia patro. Je la tria tago post la naskiĝo ni devis fari unu-monatan viziton al aliaj lokoj por vastigi sportan trejnadon. Konsiderante ke liaj edzino kaj infano bezonas lian prizorgadon, ni petis lin resti kaj ne akompani nin, sed li neniel volis konsenti al nia konsilo dirante: "Akompani ĉinajn trejnistojn estas mia devo, amikeco estas pli kara ol ĉio alia." En la lokoj vizitataj, li entuziasme helpis nin en nia laboro kaj detale prizorgis nian vivon. Li diris: "Estante inter ĉinaj fratoj mi sentas feliĉon kaj ĝojon."

FOTO DE AMIKECO

Estante en Sudano, ni vivis ĉiutage kune kun iu sudana ŝoforo kaj starigis kun li profundan amikecon. Ĉiufoje, kiam ni bezonis aŭton, li ĉiam ĝustatempe alvenis kun ĝi tute purigita. Veturiginte nin al la celloko li ne ĉesis nin akompani ĝis ni kontaktiĝis kun

trejnistoj kaj sportistoj, kiuj nin atendis en ekzercejo. Iun nokton, kiam ni finis la trejnadon, jam estis preskaŭ 23-a horo. En la aŭto, ni rimarkis, ke li ofte premas sian ventron per la maldekstra mano dum stirado. Kaj de tio ni informiĝis ke lin suferigas stomaka malsano, ĉar li ankoraŭ ne vespermanĝis, atendante nin. Tio tre maltrankviligis nin, sed li diris sen ia malbonhumoro: "Estas nenio, mi nur plenumas mian devon." De tiam, antaŭ forveturo aŭ post reveno malfrua ni ĉiufoje preparis por li teon kun manĝeto. Iufoje, lia infano malsaniĝis, ni portis kun li la infanon al nia kuraca taĉmento. Kiam ni estis forlasontaj Sudanon, li speciale invitis nin al Nilo por preni foton kun la torenta rivero kiel fono. Je la adiaŭo, karesante la foton li emocie larmis, dirante: "Mi pendigos la foton en mia ĉambro kiel ĉiaman memoraĵon de nia amikeco."

AMIKA KAMPADO

Decembro estas la plej bela monato en Sudano, tiam la vetero estas plej agrabla kaj la pejzaĝo aparte bela. Ĝuste en tia tempo la studenta asocio de la Sudana Korpo-Kultura Instituto speciale invitis ĉinajn trejnistojn al ilia semajnfina kampado.

En ne tre granda arbaro apud Nilo, geamikoj de la du landoj sidiĝis en cirklo sur ora herbejo kaj kore babilis pri la amikeco. Inter la studentoj sin trovis membro de la Ŝtata Vira Korbopilka Teamo de Sudano, kiu vizitis iam Ĉinion, li nombris la lokojn, kiujn li vizitis: Pekino, Ŝanhajo, Vuhan, Ŝenjang kaj aliaj urboj, kaj emocie rememoris pri la varmaj bonvenigoj kaj amikaj akceptoj, kiujn li ricevis en Ĉinio. Multaj sudanaj geamikoj rigardis lin envie. Iom poste li ekstaris kaj kantis la kanton *Mi Amas la Pordegon Tian-anmen* en la

ĉina lingvo, ankaŭ ni ekstaris kaj kantis ĵus lernitan sudanan kanton en la araba. En akompano de la ĝoja kantado, sudanaj geamikoj ekdancis. La bela danco kaj la sonora kanto donis plian ĉarmon al la pejzaĝo de Nilo.

Estis tempo por manĝo, sudanaj amikoj ekbruligis tendarfajron, ĉeloke buĉis ŝafon kaj bakis ĝin en la fajro por inviti la ĉinajn gastojn al gustumado de la nacistila pikniko. Ili tranĉendis la ventron de la bakita ŝafo kaj regalas la gastojn per la ĵus elprenita ŝafhepato. Laŭ la loka moro la hepato estas por la plej respektindaj gastoj. Kiam ni manĝis la bongustajn hepaton kaj ŝafajon, ni sentis varmon de la sudana popolo.

MANIFESTO DE PROFUNDA AMIKECO

Meze de februaro, kiam ni kaj la sudana sporta trejnista trupo faris trejnadon en El Obeid, la tiea virina normala kolegio aparte invitis nin fari tablotenisan ludon por ili. Kiam la lernantinoj informiĝis pri nia konsento, ili ekbolis de ĝojo kaj purigis sian tutan lernejon. Post nia ludo, junulinoj ĉirkaŭis nin kaj bombardis nin per diversaj demandoj pri Ĉinio. Iu demandis: "Ĉu Prezidanto Maŭ fartas bone?" Multaj junulinoj tuj respondis: "Sendube, Prezidanto Maŭ fartas tre bone, ĉar antaŭ kelkaj jaroj li ankoraŭ transnaĝis Jangzi-riveron!" Tiu respondo nin tre kortuŝis.

Kiam falis la nokta vualo kaj ni pretis forlasi la kolezion, entuziasmaj lernantinoj prezentis al ni lanajn trikitajn skarpajn kiel donacojn, kiujn ili pretigis tagnocte kaj en kiujn estas kuntrikita la profunda amikeco de la sudana popolo al la ĉina. Transpreninte ilin kaj volvinte ilin sur niajn kolojn, ni sentis varman fluon trakurantian nian korpon.

Elfoso de fosilio de antikva elefanto de la Flava Rivero

de HUANG VANPO

EN granda ekspozicia salono de la Pekina Natura Muzeo, oni povas vidi grandegan fosilion de antikva elefanto. Ĝi estas speco de stegodono kun longeco de 8 metroj kaj alteco de 4 metroj. Ĝi apartenas al rostruloj kaj vivis antaŭ 2,000,000 jaroj. Ĉar ĝi estas trovita en la baseno de la Flava Rivero, oni ĝin nomas "Flav-rivera stegodono", aŭ populare "Flav-rivera antikva elefanto".

La skeleto de tiu antikva elefanto estas farita preskaŭ tute el ĝia fosilio, escepte de la vostaj ver-

tebroj. La fosilio entenas incizivojn longajn je pli ol 3 metroj, ankaŭ la langoston malofte troveblan. Inter la pli ol 100 pecoj de piedostoj, ankaŭ finaj piedfingraj ostoj kun diametro de nur 3-4 centimetroj estas komplete trovitaj. Tiel plene konservita fosilio de stegodono estas tre rara en la mondo.

TROVO DE LA ANTIKVA ELEFANTO

En printempo de 1973, kiam oni arde konstruis akvoutiligajn objektojn sur leŭsa altebenaĵo de Gansu-


provinco, sur la konstruejo ĉe la buŝo de la rivero Malian, konstruantoj-kampanoj trovis du dikajn kaj fortajn "drakostojn" (dentoj de la elefanto), ili tuj blokadis la lokon kaj raportis la aferon al la supera instanco.

Sekve de tio, la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Provinca Muzeo de Gansu alsendis laborantojn por elfosi.

La trovloko de la antikva elefanto estis sur la kruta bordo dekstre de la rivervalo kovrita de leŭsa tavolo dika je 200 metroj, sub kiu estas tavolo el gruzo, sablo kaj sableca argilo. La tuta ostaro de la antikva elefanto estis kune konservita en tereno de 12 kvadrataj metroj, la tuto estis klare videbla kaj ĉiuj partoj interligitaj. La korpo de la elefanto oblikve eniĝinta en tavolon de sableca argilo kaj sablo estis en pozo nek stara nek kuŝa. Oni opiniis, ke probable, kiam ĝi soifis kaj volis trinki el la rivero aŭ ĝi volis transpasi ĝin, ĝi glitiĝis subite en tre molan koton, enfundiĝis iom post iom kaj dronis.

2,000,000 jaroj forpasis kaj la antaŭaj riveroj, lagoj kaj stepoj leviĝis kiel leŭsa altebenaĵo kaj formiĝis multaj montoj kaj nova

Fosilio de antikva elefanto de la Flava Rivero




riverego, kiu fluis preter la kuŝejo de la antikva elefanto post longa geologia ŝanĝigado.

EN KIO VALORAS LA FLAV-RIVERA ANTIKVA ELEFANTO?

La stegodono, kiu vivis en plioceno de terciaro kaj plejstoceno de kvaternaro (de antaŭ 10,000,000 ĝis antaŭ 2,500,000 jaroj respektive), estas jam delonge malaperinta. Ĝis nun, ties fosilioj estis trovitaj ekde la 50-aj jaroj de la 19-a jarcento nur en nordorienta parto de Afriko kaj en Azio, ĝenerale en nordo de ekvatoro kaj ne pli norde ol 50 de norda latitudo, kaj la jam priskribitaj specimenoj ĝis nun estas pli ol 20, kiuj dislokiĝis en nordorienta Afriko kaj la suda kaj orienta partoj de Azio, kaj plej norde en Ĉinio, en kiu estas trovitaj plej multaj stegodonoj, ĝis nun pli ol 10 specoj, ĉirkaŭ duono de la sumo trovita en la tuta mondo. El la tuta sumo trovita en Ĉinio la duono estas trovita post la Liberiĝo.

Kvankam la studo de stegodonoj jam havas historion de pli ol 100 jaroj, tamen ĉar antaŭ la trovo de la flav-rivera antikva elefanto, estis trovitaj nur dentoj aŭ kranioj aŭ aliaj unuopaj ostoj nepovantaj formi kompletan skeleton, oni ne povis havi certan imagon pri ĝia kompleta figuro. Nun oni povas klare vidi, ke tiu ĉi jam tute malaperinta stegodono estis giganta animalo multe pli granda ol la du specoj de la nun ekzistantaj — la aziaj elefantoj vivantaj en Hinda Subkontinento, Birmo, Malajzio, Tajlando kaj en Hiŝuangbanna de Ĉinio, kaj la afrikaj elefantoj vivantaj en Afriko. Ĝi havis preskaŭ kvadratan kapon, ŝvelaĵojn sur la dorso kaj ŝultroj, longajn gambojn, ebenajn molarojn kaj platajn, rektajn kaj fortajn incizivojn kaj pro-



La sago montras la lokon kie la fosilio de antikva elefanto de la Flava Rivero estas trovita.

fundan nazkavon, kio montras ke ĝi havis rostron pli grandan kaj pli fortan ol tiu de la nuna elefanto.

La ĉina scienca esplora teamo faris enketon kaj esploran fosadon al la ĉirkaŭa medio de la antikva elefanto. Oni trovis ankaŭ molkrasnan testudon (*Trionyx sinensis*), struton, kamelon, stepan sovaĝĉevalon, arkidiskodonon (*Archidiskodon st.*), antilopon, ktp. antikvajn animalojn, kiuj vivis ĉe river- kaj lagbordo, herbokreskaj sablogrundo, stepo kaj arbedaro. Krome en la tertavolo, en kiu troviĝis la flav-rivera elefanto oni trovis ankaŭ sporfosiliojn de pluraj vegetaĵoj, plej multe el ciperacoj, kreskintaj sur humidaj lokoj.

Sur la bazo de analizado kaj studado pri la fosilia materialo kaj la tertavolo, en kiu troviĝis la antikva elefanto, oni povas rezoni, ke la klimato de la nuna orienta Gansu estis tiam pli varma kaj seka, speco de klimato de varmzona seka stepo, tre simila al tiu de la sudo de Saharo, kie estas stepo kun mal-

multaj arboj kaj vagas afrikaj elefantoj kaj ĝirafoj. La longaj gamboj kaj rostron de la flav-rivera antikva elefanto oportunaj por preni manĝon ĝuste adaptiĝis al tia medio.

De la grandega korpo, kvadrata kapo, dikaj kaj longaj incizivoj kaj mallarĝa pelvo, la ĉinaj paleontologoj konjektas ke ĝi estis vira elefanto. De la mueldentoj kaj skeleta formo, ili taksas ankaŭ, ke ĝi estis maljuna elefanto de pli ol 100 viv-jaroj.

La fosilio de la antikva elefanto, kies kranio pezis 3 tunojn, troviĝis en malmola ruĝtera tavolo, kaj estis sufiĉe malkompakta kaj fragila. Tial oni multe penis por ĝin bone elfosi, transporti, ripari kaj kunmeti. Ekzemple, por bone kaj sendifekte elporti ĝin de la trovloko, centoj da laborantoj elhakis speciale tiucele provizoran vojon. Ke nun la antikva elefanto estas elmontrata en la Pekina Natura Muzeo, tio ankaŭ estas granda frukto de Ĉinio en paleobiologio, akirita en la Granda Proleta Kultura Revolucio.

NOVAJ LIBROJ PRI LERNO DE DAĜAJ EN AGRIKULTURO

En la vigla disvolviĝo de la amasa movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo, la eldonejoj de Pekino eldonis nombrojn da libroj, kiuj raportas la sukcesojn kaj sperton de Daĝaj-brigado kaj Hijang-gubernio kaj la sperton de aliaj lokoj de la tuta lando en lerno de Daĝaj.

En la lastaj jaroj oni jam eldonis en la tuta lando librojn de pli ol 300 titoloj, kiuj speciale raportas pri la movado de lerno de Daĝaj kaj el kiuj multaj estas ankaŭ en lingvoj de nacimalplimultoj. Inter la nove eldonitaj troviĝas "Pri la Movado de Lerno de Daĝaj en Agrikulturo", "K-do Ĉen Jongguy k.a. Kamaradoj pri la Sperto de Daĝaj kaj Hijang", fotoalbumo "Daĝaj-tipa Gubernio Hijang" k.a.

Estas eldonitaj ankaŭ romanoj, poemoj, bildlibroj kaj kantaroj temantaj pri la lerno de Daĝaj kaj agrikultura meĥanizado.

RAPIDE MULTIĜAS LABORISTAJ UNIVERSITATOJ DE ŜANHAJO

Ĝis decembro de 1975, jam fondiĝis en Ŝanhajo 1,200 laboristaj universitatoj kun ĉirkaŭ 50,000 studentoj.

Laborista universitato unue aperis en aŭtuno de 1968, kiam la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko fondis en si la unuan laboristan universitaton. Ĝis la fino de junio lastjare la nombro de laboristaj universitatoj jam superis 360. Poste per interŝanĝado de sperto kaj reciproka stimulo la nombro rapide kreskis, tiel ke ĝis la fino de la

lasta jaro oni nombris pli ol 1,200 laboristajn universitatojn. En la lastaj jaroj jam 5,000 laboristoj finis studon en ili. Tio ne nur senĉese plifortigas kaj kreskigas la vicojn de teknikistoj laboristaj, sed ankaŭ plifortigas la gvidon de la laborista klaso en teknikaj kampoj.

NOVAJ DIPLOMITOJ EL LA CENTRA INSTITUTO POR NACIMALPLIMULTOJ

En la fino de la pasinta jaro pli ol 100 studentoj de diversaj naciecoj faris sian studon en la Arta Fakultato de la Centra Instituto por Nacimalplimultoj.

Tiuj diplomitoj estas la dua grupo de artistoj kulturitaj de la instituto por nacimalplimultaj regionoj ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ili estas de naciecoj mongola, tibeta, uĝura, huja, taĝika, dahura kaj salaa, inter kiuj plejparto estas idoj de liberigitaj servutuloj, malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj, malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj.

En la lernotempo de tri jaroj ili ricevis rigoran trejnadon pri fundamentaj teknikoj kaj multfoje iris al nacimalplimultaj regionoj, por tie lerni kaj labori kune kun laboristoj, kamparanoj kaj paŝtistoj de diversaj naciecoj, kaj por lerni iliajn elstarajn artojn, kaj dank' al tio ili multe progresis en sia tekniko. Ili fervore faris prezentadojn por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de diversaj naciecoj, helpis tieajn amasojn levi ilian literaturan kaj artan nivelon kaj estis tre bonvenaj al la amaso.

ESTAS TROVITAJ GRANDA-NOMBRAJ FOSILIOJ DE PALEOCENAJ MAMULOJ

Lastatempe niaj sciencistoj trovis grandnombrajn fosiliojn de paleocenaj mamuloj en Interna Mongolio. La trovo certigas nedubeble la ekzis-

ton de la paleocena tavolo en la regiono de la nuna Interna Mongolio, kaj plenigis la gravan blankon en la tabelo de la geologiaj tempoj de norda Ĉinio.

Paleoceno komenciĝinta de antaŭ 60 milionoj da jaroj estis la komenca periodo de kenozoiko, la plej lasta granda erao de la terglobo, en kiu grandkvante generiĝis mamuloj post la pereado de diversaj mezozoikaj dinosaŭroj. Multaj kladoj de mamuloj, inkluzive de la praavo de primato al kiu apartenas la homaro ekaperis kaj evoluis en paleoceno. Tial la trovo de la paleocena tavolo kaj la fosiliaj mamuloj havas grandan valoron por esplori la geologian historion pri mezozoiko de Azio kaj la devenon kaj evoluon de mamuloj. La trovitaj fosiliaj mamuloj ampleksas 15 speciojn en 6 branĉoj. Inter tiuj fosilioj iuj estas ege raraj en la mondo pro ilia integreco.

ALIA NOVA HIDROELEKTREJO SUR LA SUPRA PARTO DE LA FLAVA RIVERO

Post la finkonstruo de la hidroelektrejo Liugiahia, nia lando baldaŭ finkonstruos alian novan hidroelektrejon Bapanhia sur la supra parto de la Flava Rivero. La tri generatoroj instalitaj en la fino de la pasinta jaro jam produktas elektron. La hidroelektrejo havos sume 5 generatorojn po 36,000 kilovatoj.

La hidroelektrejo situas en kanjono okcidente de Lanĝou. Ĝia digo altas 33 metrojn kaj la totala kapacito de akvokonserve superas 49 milionojn da kubmetroj. Ĉar pli supre la elektrejo havas du grandajn akvokonservejojn, kiuj reguligas la fluon, ĝia elektroproduktado ne estos influata de sezonsanĝo. La hidroelektrejo plipotencigis la elektroenergion de la tri provincoj Ŝen-

(Daŭrigota sur p. 37)

Viglecplena juna generacio



Intelektaj gejunuloj de Hiakiaŭ-komunumo, Hjuven-gubernio, Guangdong-provinco, ludas gravan rolon en la amasa movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo.



Pekinaj kaj Jan-an-aj intelektaj gejunuloj fiksloĝigintaj en Gaŭjuan-brigado de Jan-an kune faras sciencan eksperimenton pri kulturado de tritiko por akiri riĉan produkton.

Sanhaja intelekta junulino fizike laboranta en montregiono de Anhuj helpas komunumanojn lerni politikon kaj kulturon en la vesperlernejo de la produktataĉmento.





Intelekta junulo el Senjang fiksloĝiginta sur la stepo
Aru Horĉin ofte faras socian enketadon inter paŝtistoj.

En la 4-a de februaro, 1975, forta sismo okazis en la regionoj Hajĉeng kaj Jingkoŭ sude de Liaŭning-provinco de nia lando. Sub la kora zorgado de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, la plagitaj popolanoj, disvolvante revolucion heroismon, sinapogante sur propraj fortoj kaj peneme luktante, akiris gravajn venkojn en disvolvo de produkto kaj rekonstruo de la hejmlokoj. En 1975, tiuj du gubernioj kreis respektive plej altan rekordon de la produktokvanto de greno. Riĉan rikolton oni akiris ankaŭ en produktado de kotono, oleo, frukto kaj silkraŭpo. Nun, la popoloj energie efektivas la alvokon de la Tutlanda Kunveno por Lerno de Daĝaj en Agrikulturo kaj batalas por gajni novan venkon en ĝeneraligo de Daĝaj-tipaj gubernioj.




Kvankam en la okcidenta parto de Jingkoŭ-gubernio okazis eksterordinara inundo post la forta sismo, tamen la vasta amaso akiris riĉan rikolton de rizo dank' al energia batalado kontraŭ la katastrofoj.

reston portas la regiono plagita de sismo



ŭki-komunumo de Hajĉeng-gubernio, kiu venkis la sismon, akiris riĉan rikolton de koton en 1975.



Maŭki-komunumo de Hajĉeng-gubernio konstruis post la sismo akvedukton je pli ol 400 metroj longan, kaj dank' al tio 400 hektaroj da kampoj ricevas akvumadon.



Kun granda energio la vasta amaso de Jingkoŭ-gubernio konstruas akvokonservejon por plifruue efektiviĝi altan kaj stabilan produkton de agrikulturo.



Respondeculoj de Jingkoŭ-gubernia Komitato de KPC laboras kune kun komunumanoj sur akvoutiliga konstruejo en sismoplagita loko.



Nova socialisma vilaĝo aperis post la sismo en Luobo-brigado, Balikomunumo, Hajĉeng-gubernio, kiu situis siatempe en la centro de la sismo.



41.879

